


Transponta Esperanto- Kongreso



germana · pola · fervojista

Frankfurt (O) / Słubice
21-a ĝis 24-a de Majo 2021

· NAJBAROJ ·



FUNDACJA WSPÓŁPRACY
POLSKO-NIEMIECKIEJ
STIFTUNG
FÜR DEUTSCH-POLNISCHE
ZUSAMMENARBEIT

Enhavo

Salutvortoj	3
Enkondukaj prelegoj	12
Fakprelegoj IFEF	14
Tagordoj IFEF	16
SUS	18
Prelegoj kaj forumoj	20
Programo	24
Sabatmatenaj intermezoj	28
Muzikaj vesperoj	28
Listo de partoprenantoj	31
Interlingvistikaj Studoj 2021–2024 ..	36
Informoj pri estontaj eventoj	37
Asocio Nova Familio	46
Donacintoj	47
Registraĵoj de la kongreso	47



Ni dankas

En la preparoj por la Transponta Kongreso kaj ĝia organizado partoprenis multaj personoj, kiuj normale enirus la Lokan Kongresan Komitaton. Inter ili (krom la prezidantoj de PEA kaj GEA) aparte elstaris: Barbara Brandenburg, Guido Brandenburg, Andreas Diemel, Goar Engeländer, Franz Kruse, Agnieszka Mozer, Ronald Schindler kaj Heinz Sprick.

Al ili kaj al ĉiuj aliaj helpantoj
nian koran dankon!



Liebe Teilnehmerinnen und Teilnehmer des Kongresses, liebe Leserinnen und Leser,

ich begrüße Sie sehr herzlich zum Deutsch-Polnischen Esperantokongress. In diesem Jahr haben der Polnische und der Deutsche Esperantobund sowie die Internationale Föderation der Eisenbahner-Esperantisten die Veranstaltung pandemiebedingt ins Internet verlegt. Meinen Dank dafür!

Das mehrtägige Treffen widmet sich dem Thema „Nachbarn“, und da fühle ich mich auch in meiner Eigenschaft als Koordinator für die deutsch-polnische zwischengesellschaftliche und grenznahe Zusammenarbeit direkt angesprochen. Zumal die ursprüngliche Planung für 2020 vorgesehen hatte, dass die Tagung in Frankfurt (Oder) und Stubice stattfinden sollte.

An der Grenze zwischen Brandenburg und Polen konnte man vor Corona täglich sehen und erleben, was gute Nachbarschaft bedeutet. Die Menschen beiderseits von Oder und Neiße sind sich in den vergangenen Jahren in vielerlei Hinsicht nahegekommen. Sie passieren mit einer Selbstverständlichkeit die Grenze, wie es noch vor gar nicht allzu langer Zeit unvorstellbar gewesen wäre. Eine enge politische Abstimmung haben unsere Länder auch für die gegenwärtige Corona-Zeit vereinbart. Die Rückkehr zur Normalität des Miteinander bleibt unser gemeinsames Ziel.

Zur besseren deutsch-polnischen Verständigung tragen auch die Esperantofreundinnen und –freunde auf beiden Seiten mit ihren Aktivitäten bei. Ich begrüße das sehr. Polen hat ja als „Geburtsland“ auch ein besonderes Verhältnis zu der internationalen Sprache: Sie ist dort Teil der offiziellen Liste des immateriellen Kulturerbes.

Esperanto verbindet Völker. Wenn also das Interesse an Esperanto in letzter Zeit wieder zunimmt, ist das eine sehr gute Nachricht – auch im Verhältnis zwischen Deutschland und Polen als Partner und Nachbarn in Europa.

In diesem Sinne wünsche ich Ihnen einen erfolgreichen Kongress mit vielen neuen und interessanten Erkenntnissen.

Dr. Dietmar Woidke
Ministerpräsident des Landes Brandenburg

Karaj gepartoprenantoj de la kongreso, karaj gelegantoj,

mi tre kore bonvenigas vin al la german-pola Esperanto-kongreso. Ĉijare la pola kaj la germana Esperanto-asocioj kaj la Internacia Federacio de Esperanto-Fervojistoj pro la pandemio translokigis la aranĝon en la reton. Pro tio mi dankas!

La plurtaga kunveno estas dediĉita al la temo „najbaroj“, kaj per tio mi sentas min alparolata ankaŭ en mia funkcio kiel kunordiganto por la german-pola intersocia kaj apudlima kunlaboro. Des pli ĉar la origina plano por 2020 antaŭvidis, ke ĝi okazu en Frankfurt (Oder) kaj Stubice.

Ĉe la limo inter Brandenburg kaj Pollando oni antaŭ apero de la kronviruso povis ĉiun tagon vidi kaj sperti, kion signifas bona najbareco. La homoj ambaŭflanke de Oder kaj Neiße dum la pasintaj jaroj en multaj rilatoj proksimiĝis unu al la alia. Ili trapasas la limon tiel memkompreneble, kiel oni antaŭ ne tro longa tempo ne povintus imagi. Ankaŭ por la nuna kronvirusa tempo niaj landoj interkonsentis pri senpera politika akordigo. Reveno al normala kunestado restas nia komuna celo.

Al pli bona german-pola interkompreniĝo per siaj aktivecoj kontribuas ankaŭ la Esperanto-geamikoj sur ambaŭ flankoj. Mi tion tre aprezas. Pollando ja kiel „naskiĝlando“ de Esperanto ankaŭ havas apartan rilaton al la internacia lingvo: ĝi tie troviĝas sur la listo de ne-materia kultura heredaĵo.

Esperanto interligas popolojn. Se do la intereso pri Esperanto lastatempe denove kreskas, tio estas tre bona novaĵo – ankaŭ por la rilato inter Germanio kaj Pollando kiel partneroj kaj najbaroj en Eŭropo.

En tiu senco mi deziras al vi sukcesan kongreson kun multaj novaj kaj interesaj ekkonoj.

D-ro Dietmar Woidke
Ministroprezidanto de la lando Brandenburg



Szanowni Uczestnicy Kongresu Esperantystów,

Dwa lata temu, podczas spotkania z mieszkańcami miasta Eberswalde zapytany o europejską świadomość odpowiedziałem, że do jej zaistnienia potrzeba spełnienia dwóch warunków: wspólnych, europejskich podręczników historii oraz wspólnego europejskiego języka. Dodatem, że nie może być nim angielski, bo to język Brytyjczyków, którzy właśnie opuścili Unię Europejską, ani Amerykanów, którzy w niej nie są. Takim językiem nie może być żaden język narodowy, bo oznaczałoby to nieuzasadnioną przewagę. Nie może nim też być martwy język, jakim jest łacina. Może być tylko i wyłącznie esperanto. Z kilku powodów. Dlatego, że korzysta z najlepszych elementów leksykalnych i gramatycznych wypracowanych w językach narodowych w trakcie europejskiej historii. Każdy z Europejczyków odnajdzie w nim część własnej kultury. Ale także dlatego, że jego przyswojenie zabiera około 1/4 czasu potrzebnego na nauczanie się angielskiego, francuskiego czy niemieckiego. Na koniec dlatego, że wtedy wszyscy jesteśmy w tej samej sytuacji, nikt nie jest uprzywilejowany, tak jak zawsze uprzywilejowani byli Amerykanie czy Brytyjczycy. Trud, który musielibyśmy włożyć w jego przyswojenie jest nieduży. A zysk – egzystencjalnie pogłębiona komunikacja z wszystkimi Europejczykami (oraz milionami innych użytkowników esperanto). Potrzeba tylko politycznej woli! I przełamania panującej fałszywej opinii, że esperanto to język sztuczny. Wystarczy wejść do Internetu, by się przekonać, że tak nie jest, że to dynamiczny, żywy język, który się wciąż rozwija. My Polacy jesteśmy dumni z tego, iż język ten dał światu mieszkańiec polskiego miasta Białystok, Ludwik Zamenhof.

Prof. Dr. Andrzej Przytybski
Ambasador RP w Niemczech

Karaj partoprenantoj de la Kongreso de Esperantistoj,

antaŭ du jaroj, dum renkonto kun la loĝantoj de la urbo Eberswalde, demandita pri eŭropa konscio, mi respondis: por ke ĝi ekzistu, devas esti plenumitaj du kondiĉoj: komunaj eŭropaj historiaj lernolibroj kaj komuna eŭropa lingvo.

Mi aldonis, ke ĝi ne povas esti la angla, ĉar ĝi estas la lingvo de la britoj, kiuj ĵus forlasis Eŭropan Union, kaj lingvo de la usonanoj, kiuj ne estas tie. Neniu nacia lingvo povas esti tia lingvo, ĉar ĝi signifus nepravigeblan avantaĝon. Nek ĝi povas esti mortinta lingvo kiel la latina. Tiun rolon ebligas nur Esperanto, ĉar ĝi uzas la plej bonajn leksikajn kaj gramatikajn elementojn evoluigitajn en la naciaj lingvoj dum eŭropa historio. Ĉiu el la eŭropanoj trovas en ĝi parton de sia propra kulturo. Sed ankaŭ pro tio, ke por lerni Esperanton necesas ĉirkaŭ kvarono de la tempo bezonata por lerni la anglan, francan aŭ germanan. Fine, ĉar ni ĉiuj estas en la sama pozicio tiam, neniu estas privilegita, ĉar la usonanoj aŭ la britoj ĉiam estis privilegiitaj.

La peno, kiun ni devus fari por ekuzi ĝin, estas malgranda, kaj la profito estas ekzistence profundigita komunikado kun ĉiuj eŭropanoj (kaj milionoj da aliaj parolantoj de Esperanto). Oni bezonas nur politikan volon kaj rompon de la reganta falsa opinio, ke Esperanto estas artefarita lingvo. Sufiĉas vidi en interreto, ke ĝi estas dinamika, viva lingvo, kiu konstante evoluas.

Ni, poloj, fieras pri tio, ke Ludoviko Zamenhof, loĝanto de la pola urbo Bjalistoko, donis ĉi tiun lingvon al la mondo.

Prof. d-ro Andrzej Przytybski
Ambasadoro de la Pola Respubliko

Salutvorto de la germana ambasadoro



Meine sehr geehrten Damen und Herren,

hier in Warschau entstehen beeindruckend schnell neue Wandbilder, die den Straßen mehr Farbe verleihen und oft einen genau definierten Inhalt vermitteln. Neben großflächiger Werbung aller Art gibt es auch immer wieder Bilder, die erinnern, zum Nachdenken bringen und Interesse wecken. Ein besonderes Bild schmückt seit fast 10 Jahren zu beiden Seiten einen Durchgang in der Nowolipki-Straße. Das Freilicht-Gemälde zeigt Ludwik Zamenhof zusammen mit verschiedenen Persönlichkeiten der Popkultur und Zitaten auf Esperanto und Polnisch. So wie bei diesem farbenfrohen Werk begegnet man Esperanto in Warschau und im ganzen Land in Texten, Kursen und Schildern. Die Verbreitung der Sprache ist auch Ihr Verdienst.

Sprache baut Brücken und diese grenzüberschreitende Verständigung wird besonders im Fall von Esperanto deutlich. Der Deutsche und der Polnische Esperanto-Bund setzen sich mit großem Engagement dafür ein. Ich bin zuversichtlich, dass Ihre Arbeit auch weiterhin deutliche Spuren hinterlassen wird.

Für Ihre Tagung und die Veranstaltungen in den kommenden Tagen wünsche ich Ihnen gutes Gelingen und allen Teilnehmern anregende Vorträge und Diskussionen.

Dr. Arndt Freytag von Loringhoven
Botschafter der Bundesrepublik Deutschland

Tre estimataj gesinjoroj,

ĉi tie en Varsovio kun impresa rapideco estiĝas novaj ĉemuraj bildoj, kiuj donas pli da koloro al la stratoj kaj ofte peras precize difinitan enhavon. Krom ĉiaspeca grandspaca reklamo aperas ĉiam denove bildoj, kiuj pensigas kaj vekas intereson. Aparta bildo jam de preskaŭ 10 jaroj ambaŭflanke ornamas trairon en la Nowolipki-strato. La liberaera pentraĵo montras Ludwik Zamenhof kune kun diversaj personecoj de la pop-kulturo kaj citaĵoj en Esperanto kaj la pola. Same kiel en ĉi tiu multkolora verko oni renkontas Esperanton en Varsovio kaj en la tuta lando en tekstoj, kursoj kaj ŝildoj. La disvastigo de la lingvo estas ankaŭ via merito.

Lingvo konstruas pontojn, kaj tiu translima interkompreniĝo aparte vidiĝas en la kazo de Esperanto. La germana kaj la pola Esperanto-asocioj subtenas ĝin kun granda engaĝiĝo. Mi fidas ke via laboro ankaŭ estonte postlasos klarajn ŝpurojn.

Por via kunveno kaj la eventoj dum la venontaj tagoj mi deziras al vi sukceson, kaj al ĉiuj partoprenantoj stimulaĵajn prelegojn kaj diskutojn.

D-ro Arndt Freytag von Loringhoven
Ambasadoro de la
Federacia Respubliko Germanio

Salutvorto de la urbestro de Frankfurt/Oder

Sehr geehrter Herr Schindler,
verehrte Kongressteilnehmerinnen
und -teilnehmer,

ich freue mich, dass Sie Ihren
Kongress ausdrücklich mit unserer
Europäischen Doppelstadt verknüpfen,
auch wenn Sie aufgrund der
Corona-Pandemie nicht physisch bei uns
präsent sein können, sondern die virtuelle Welt als
Veranstaltungsort wählen mussten.

1887 veröffentlichte der russisch-jüdische,
im polnischen Białystok geborene Arzt Ludwik
Zamenhof die Sprache Esperanto. Sein Ansinnen
war es, mit einer neuen, einfachen Sprache,
die Elemente verschiedener Kultursprachen
vereint, zur Verständigung zwischen den Völkern
beizutragen und Grenzen zwischen Nationen
und Religionen zu überwinden. Sein humanistischer
Ansatz hat bis heute nichts von seiner
Bedeutung verloren. Wir in der Europäischen
Doppelstadt Frankfurt (Oder) & Słubice bemühen
uns darum, neben Englisch unsere beiden
Nachbarsprachen Polnisch und Deutsch zu stärken
und somit zu einer partnerschaftlichen,
nachhaltigen Entwicklung der Grenzregion
beizutragen.

Ihr deutsch-polnischer Esperanto-Kongress
passt gut zu unserer internationalen Doppelstadt,
wir heißen Sie – virtuell – sehr herzlich
bei uns willkommen!

Stadt Frankfurt (Oder) René Wilke
Oberbürgermeister



© Stadt Frankfurt (Oder)

Szanowny Panie Schindler,
drodzy uczestnicy kongresu,

cieszę się, że powiązaliście swój
kongres z naszym Europejskim
Dwumiałem, nawet jeśli nie
możecie być tu z nami fizycznie
obecni z powodu pandemii

koronawirusa i wybraliście świat wirtualny
jako miejsce spotkania.

W 1887 roku rosyjsko-żydowski lekarz Ludwik
Zamenhof, urodzony w Białymstoku, opublikował
podstawy języka Esperanto. Jego intencją
było przyczynienie się do porozumienia między
ludźmi i przezwyciężenia granic między narodami
i religiami za pomocą nowego, prostego
języka, który łączy elementy różnych kodów
kulturowych. Jego humanistyczne podejście
do dziś nie straciło nic ze swojego znaczenia.
My w Europejskim Dwumieście Frankfurt nad
Odrą i Słubice dążymy do wzmocnienia naszych
dwóch, sąsiadujących ze sobą języków, polskiego
i niemieckiego, obok angielskiego, i w ten sposób
przyczyniamy się do partnerskiego, zrównoważonego
rozwoju regionu przygranicznego.

Wasz Polsko-Niemiecki Kongres Esperanto
wyśmienicie wpisuje się w nasze międzynarodowe
Dwumieście, witamy Was – wirtualnie –
bardzo serdecznie u nas!

Estimata sinjoro Schindler,
estimataj gepartoprenantoj de la kongreso,
mi ĝojas ke vi eksplicite ligas vian kongreson
kun nia eŭropa duopa urbo, eĉ se vi pro la
Corona-pandemio ne povas fizike ĉeesti ĉe ni,
sed devis elekti la virtualan mondon kiel
kongreslokon.

En 1887 la rusa-juda kuracisto Ludwik
Zamenhof, kiu naskiĝis en la pola urbo
Białystok, publikigis la lingvon Esperanton. Lia
intenco estis per nova, facila lingvo, kiu kunigas
elementojn el diversaj kulturlingvoj, kontribui
al interkompreniĝo inter la popoloj kaj superi
limojn inter nacioj kaj religioj. Lia homaraneca

aliro ĝis hodiaŭ neniel perdis sian gravecon.
Ni en la eŭropa duopa urbo Frankfurt (Oder) kaj
Słubice tial klopodas krom la angla fortigi niajn
najbarajn lingvojn, la polan kaj la germanan, kaj
tiamaniere kontribui al partnereco, daŭripova
evoluo de la limregiono.

Via german-pola Esperanto-kongreso bone
konvenas al nia internacia duopa urbo, kaj ni –
virtuale – tre kore bonvenigas vin ĉe ni!

Urbo Frankfurt (Oder) René Wilke
Ĉefurbestro



Geschätzte Esperantisten!

Es ist mir eine Ehre, euch als geschäftsführender Generalpräsident der FISAIC im Namen des gesamten Exekutivausschusses auf das Herzlichste beim 72. Internationalen Eisenbahner-Kongress, der erstmals virtuell abgehalten wird, begrüßen zu dürfen.

Klar ist es, dass der persönliche Kontakt, die Gespräche, die Zusammenkünfte und das gemütliche Zusammensein fehlen. Daher ist es in dieser schwierigen Zeit, die nun leider schon seit über einem Jahr andauert, umso wichtiger, sich unter Gleichgesinnten auszutauschen und Kontakt zu halten.

Glücklicherweise ist die Technik schon soweit fortgeschritten, dass wir solche Veranstaltungen vorübergehend auch abhalten können, ohne uns an einem gemeinsamen Ort zu befinden.

Wir alle wünschen und hoffen, uns bald wieder vorort von Angesicht zu Angesicht sehen zu können.

Ein großes Dankeschön an den deutschen Landesverband (Stiftungsfamilie BSW & EWH) für die Organisation und Ausrichtung dieses Kongresses, insbesondere dem deutschen und dem polnischen Esperantobund, denen es trotz der Verschiebung von 2020 auf 2021 gelungen ist, fast 170 Teilnehmer aus 23 Ländern an diesem virtuellen Großereignis teilhaben zu lassen.

Ich wünsche euch auf diesem Wege einen guten Verlauf der Veranstaltung, fruchtbaren Austausch bei euren interessanten Themen, aber vor allem Gesundheit für euch und eure Angehörigen.

Alles Liebe und Gute

Kurt Neuwirth

Stellvertretender Generalpräsident der FISAIC

Estimataj esperantistoj!

Estas honoro por mi saluti vin kiel la Adjunkta Ĝenerala Prezidanto de FISAIC nome de la tuta oficejo dum la 72-a Internacia Fervojista Kongreso, kiu por la unua fojo okazas virtuale.

Estas klare, ke mankas la persona kontakto, la konversacioj, la renkontiĝoj kaj la agrabla kunestado. Tial des pli gravas en ĉi tiu malfacila tempo bedaŭrinde jam daŭranta pli ol unu jaron, interŝanĝi ideojn kun samideanoj kaj resti en kontakto. Feliĉe la teknologio estas tiel progresinta, ke ni povas provizore okazigi tiajn eventojn sen esti en komuna loko.

Ni ĉiuj deziras kaj esperas baldaŭ denove surloke revidi unu la alian vid-al-vide.

Koran dankon al la germana landa asocio (Fondaĵfamilio BSW & EWH) pro la organizado kaj okazigo de ĉi tiu kongreso, precipe al la Germana kaj la Pola Esperanto-Asocioj, kiuj malgraŭ la prokrasto de 2020 ĝis 2021 sukcesis gastigi preskaŭ 170 partoprenantojn el 23 landoj en ĉi tiu granda virtuala evento.

Mi tiel deziras al vi bonan evoluon de la evento, fruktodonan interŝanĝon pri viaj interesaj temoj, sed ĉefe sanon por vi kaj viaj parencoj.

Ĉion amindan kaj bonan

Kurt Neuwirth

Adjunkta Ĝenerala Prezidanto
de FISAIC





Liebe Teilnehmende, liebe Nachbarn,

Esperanto verbindet Menschen, wer wüsste das besser als Sie? Diese Sprache baut Barrieren ab und Brücken auf; sie ist Grundlage dafür, sich über Grenzen hinweg auszutauschen, ins Gespräch zu kommen – und im Gespräch zu bleiben.

Anfang Mai fand in Deutschland die Woche der Meinungsfreiheit für eine freie, demokratische und vielfältige Gesellschaft statt. Sie hat zum Kern, verschiedenste Meinungen zuzulassen und sie vor allem zu verstehen: Der entscheidende Faktor, dies tun zu können, ist es, eine gemeinsame Sprache zu sprechen – wie es in Esperanto eben möglich ist. Ich erzähle Ihnen nichts Neues, wenn ich sage, dass Esperanto durch seine klare Struktur als relativ leicht zu lernen gilt – aber ich gestehe, dass ich sie nicht sprechen kann: Dieses Grußwort ist mit der freundlichen Hilfe von Bodo Ehrlich übersetzt, und auch meine Begrüßungsworte, die ich während des Kongresses virtuell an Sie richten durfte, entstammen der gleichen Quelle. Vielen Dank dafür!

Auf beispielhafte Weise steht Esperanto für die Arbeit in der Stiftungsfamilie BSW und EWH: Wir wollen gemeinsam und über die Grenzen hinweg kommunizieren und die Welt damit ein bisschen besser machen. Wir wollen die Menschen verbinden und Lebensfreude vermitteln. Und nicht zuletzt wollen wir uns dafür einsetzen, dass die Bahngemeinschaft international zusammenhält.

Ich danke all denen, die durch ihr ehrenamtliches Mitwirken an diesem Kongress und am Fortkommen dieser wunderbaren Sprache dazu beitragen, das kulturelle Leben in der Stiftungsfamilie BSW und EWH um eine so schillernde Facette reicher zu machen, allen voran Bodo Ehrlich, unserem Zentralen Gruppenleiter Esperanto.

Ihnen allen wünsche ich weiterhin viel Energie und Freude, um sich den derzeitigen sowie zukünftigen Herausforderungen zu stellen und viele Menschen miteinander zu verbinden.

Ihr

Siegfried Moog

Vorsitzender Geschäftsführender Vorstand
Stiftungsfamilie BSW & EWH

Karaj partoprenantoj, karaj najbaroj

Esperanto interligas homojn, kiu sciis tion pli bone ol vi? Tiu lingvo malkonstruas barierojn kaj konstruas pontojn; ĝi estas la fundamento por translima interŝanĝo por komenco de konversacio – kaj por daŭrigo de konversacio.

Komence de Majo en Germanio okazis la semajno de libera opinio por libera, demokrata kaj varia socio. Ĝia kerno estis toleri plej diferencajn opiniojn kaj precipe kompreni ilin: La decida faktoro ebliganta tion estas paroli komunan lingvon – tiel kiel tio eblas ĝuste per Esperanto. Mi al vi rakontas nenion novan, kiam mi diras ke Esperanto estas konata kiel relative facile lernebla pro sia klara strukturo – sed mi konfesas, ke mi ĝin ne kapablas paroli: Tiu ĉi salutvorto estas tradukita kun afabla helpo de Bodo Ehrlich kaj ankaŭ miaj salutaj vortoj, kiujn mi rajtis al vi direkti virtuale devenas el la sama fonto. Koran dankon pro tio!

En ekzemplodona maniero Esperanto simbolas la laboron de la Fondaĵfamilio BSW kaj EWH: Ni volas komune komuniki trans limojn kaj tiel iom plibonigi la mondon. Ni volas konekti la homojn kaj peri vivoĝojon. Kaj nelaste ni volas subteni, ke la fervoja komunumo restu ligita internacie.

Mi dankas al ĉiuj, kiuj per sia honorofica kunlaboro en tiu ĉi kongreso kaj la vivteno de tiu grandioza lingvo kontribuas al la pliriĝo de la kultura vivo en la Fondaĵfamilio BSW kaj EWH je unu plia brilanta faceto, antaŭ ĉiuj al Bodo Ehrlich, nian centran grupgvidanton Esperanto.

Al vi ĉiuj mi deziras plue multe da energio kaj ĝojo, por alfronti la nuntempajn kaj estontajn defojn kaj interligi multajn homojn.

Via

Siegfried Moog

Prezidanto de afergvidanta estraro
Fondaĵfamilio BSW & EWH



STIFTUNGSFAMILIE
BSW & EWH



Karaj kaj estimataj kongresanoj
de la Transponta Esperanto-Kongreso,

Kiel Prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio estas por mi ĝojo kaj privilegio saluti vin okaze de via unika kongreso. Simbole landlima kunigo de la najbaraj Frankfurt (Oder) kaj Słubice, kun la fakaj fokusoĵoj fervojista kaj scienca. Okazo primediti kaj realigi la genian ideon de d-ro Zamenhof. Li provizis por nia ĝuo lingvon kulture kaj klerige transliman kaj persone transforman. Niaflanke ni kreeme defias la senton de homa apartiĝo, invitante niajn mondajn najbarojn al tuttera partopreno en antaŭe nur lokaj kaj regionaj kunvenoj. UEA sukcese donis modelon de Virtuala Universala Kongreso, nia VK, kun trimonata ĉiuloka Monda-fest'. Aliĝu al nia ĉi-jara VK, nun senpaga por membroj de UEA! Precize pro nia teknologia progreso, la venontjara germana kongreso en Oldenburg povos okazi kaj ĉeeste kaj parte virtuale.

Ni faris notindajn progresojn dum la pasinta jaro. Pri tiuj legu en la junia numero de la revuo *Esperanto*. Tiuj preparas la vojon por pli plena transformiĝo en nia venontjara agado. Antaŭ precize duonjarcento (en 1971) eldoniĝis la esearo de germana esperantisto d-ro Werner Bormann, „Bona ŝanco“. Tiam d-ro Bormann antaŭvidis pli helan perspektivon por nia lingvo. Tamen li ne povis antaŭvidi „Amikumu“ kiun klarigos al vi Chuck Smith! Ni estas nun en tute nova epoko kiu ebligas kunigi la fortojn por antaŭenigi nian idealon multe pli efike. Ĉi-jare kuniĝu kun UEA por komune plani strategiojn. Tiuj celos konfirmi al ni mem, kaj montri al la publiko, la nekontraŭdireblajn avantaĝojn por la mondo de nia plene elprovita komunikilo. Profitu la Kongreson: ĝuu, edukiĝu, kaj pensu pri via kontribuo al la florado de nia komuna laboro!

Duncan Charters
Prezidanto de
Universala Esperanto-Asocio



Salutvorto de GEA



Karaj geamikoj,

estis bona ideo: kongresi translime en la duopa urbo Frankfurt (Oder) kaj Stubice, ambaŭflanke de la interurba ponto. Ni povus malfermi la kongreson en impona aŭditorio de la Eŭropa Universitato Viadrina kaj post mallonga promenado daŭrigi la kunvenojn en la moderna konstruaĵo de Collegium Polonicum, komuna instituto de la universitatoj Frankfurt kaj Poznań tuj dekstre de la ponto. Ni loĝus ambaŭflanke kaj povus kune festi ĉe la bordo de la rivero. La kongresa temo „najbaroj” pli ol io ajn konvenas al tiu loko kun sia varia historio. Kaj ni povus kune ekskursi al la bela pejzaĝo oriente de Berlino.

Ĉion-ĉi ne vere eblas anstataŭigi per reta evento. Sed ni klopodos virtuale kiel eble plej proksimigi vin al niaj kongresurboj kaj savi tiom da enhavo, kiom eblas. Al la varia programo kontribuos la landaj asocioj el Pollando kaj Germanio, la faka asocio de la fervojistoj kaj multaj aliaj konatoj el la Esperanto-mondo. Dankon al ili ĉiuj, dankon al la Fonduso por German-Pola Kunlaboro pro la financa subteno, kaj dankon al vi pro via intereso. Restas al mi nur esperi ke ĉio funkcios!

Ĝis baldaŭa revido,
Ulrich Brandenburg
Prezidanto de
Germana Esperanto-Asocio



Salutvorto de PEA



Estimataj kongresanoj,

Mi ĝojas havi la okazon por salutvorti al Germana-Pola Esperanto Kongreso, okazonta de la 21-a de majo 2021 ĝis la 24-a de majo 2021. Mi estas aparte kontenta noti, ke malgraŭ pandemia tempo kaj unujara prokrasto de la kongreso la aranĝo okazos en virtuala formo. Dum Transponta Kongreso 2021 ni sukcesis aranĝi komunan kunlaboron. Mi kore dankas al GEA kaj IFEF pli spertaj organizantoj, kiuj ludis gravan rolon dum ĝia organizado. Internacia kunlaboro kuraĝigos nin ĉiuj al novaj taskoj en nova certe pli bona mondo.

Ni deziras al la kongresanoj agrablan partoprenon, kun la espero, ke vi kun plezuro dediĉos sian tempon al nia evento.

Robert Kamiński
Prezidanto de
Pola Esperanto-Asocio





Karaj geamikoj,

mi esperis ĝis la lasta momento, ke ni renkontiĝu ĉijare en Frankfurt apud Oder kaj Stubice por kune ĝui la 72-an IFEF-kongreson, jam prokrastitan pasintjare pro la pandemio. Bedaŭrinde la nuna kunteksto, pli negativa ol atendite, devigas la organizantojn nuligi denove la ĉeestan kongreson kaj proponi komplete virtualan IFK. Pro tio miaj salutvortoj estas adresitaj ne nur al la kongresanoj, sed al ĉiuj esperantistaj fervojistoj kaj amikoj de fervojo. Mi invitas vin, ke – dum kelkaj tagoj, de 21a ĝis 24a de Majo – vi direktu vian tutan atenton al programo, kiun pretigis niaj kolegoj el LKK. Dum du jaroj ili faris ĉion eblan por oferti al ni, spite al malfavoraj kondiĉoj, variajn kaj belajn programerojn, riĉajn kaj interesajn el ĉiuj vidpunktoj.

Ni ne forgesu ke, laŭ iniciato de la Eŭropa Komisiono, 2021 estas la Eŭropa Jaro de Fervojoj, cele marki plurajn gravajn datrevenojn por la fervoja transporto:

- la centjariĝon de la starigo de UIC (Union Internationale des Chemins de Fer – Internacia Fervoja Unio)
- la 175-an datrevenon de la unua fervoja ligo inter du ĉefurboj de EU (Parizo – Bruselo)
- 40 jarojn de TGV
- 30 jarojn de ICE

En la jaro 2021 aro da eventoj, kampanjoj kaj iniciatoj prezentos la avantaĝojn por civitanoj, ekonomio kaj klimato de la antaŭvidita unika eŭropa fervoja reto sen limoj. Al tiuj eventoj ligas sin ankaŭ nia aranĝo per la enhavo de la dumkongresaj prelegoj, kiuj alportas la kontribuon de niaj fakuloj al reliefigo de la valoro de fervojo kiel daŭripova, ekologia, klimat-protektanta, noviga kaj sekura sistemo de transporto. La faka programo de la kongreso estas pruvo pri la spertoj en la kampo de inĝenierado kiel grava parto de nia eŭropa heredaĵo.

Mi invitas vin travivi kune ĉi tiun eventon kiel okazon esti eĉ pli proksimaj anime unu la alian ene de nia fervojista familio. Kvankam izolitaj, ni profitu por ĝui plenplene la promesitan belan etoson de la nuna kongreso!

psik. Rodica TODOR
Prezidantino de IFEF





Pol-germana interproksimiĝo: la kontribuo de esperantistoj

Ulrich Lins

Nuntempe, post la germana reunuiĝo kaj la aliĝo de Pollando al EU, la pol-germanaj rilatoj estas en kontentiga stato. Oni kelkfoje eĉ preteratentas, kiom streĉitaj ili estis dum la antaŭaj jardekoj.

Estis longa kaj pena vojo al la nuna stato. Mi volas mallonge resumi la kontribuon, kiun faris esperantistoj por interproksimigi popolojn kaj germanojn. Ni povas komenci ĉe Zamenhof, kiu jam en Bjalistoko renkontis la germanan lingvon, kaj Antoni Grabowski, unu el la plej notindaj pioniroj de Esperanto. Li kaj aliaj ekkreskis en limregionoj inter Pollando kaj Germanio, kiujn trafik teritoriaj ŝanĝoj post la Unua Mondmilito. Grabowski estis sciencisto, kaj inter la polaj agantoj por Esperanto simile elstaris Odo Bujwid kaj Jerzy Loth. Menciante tiujn gravulojn, ni tamen konsciu, ke Esperanto celis esti atentata ne unuavice de intelektuloj, sed de ordinaraj homoj (kaj utili al ili). Gravaj estis ekzemple la fratoj Fethke, idoj de german-polaj gepatroj; unu el ili, Jan, famiĝis per filmoj kaj per Esperantaj noveloj. La katastrofo de la Dua Mondmilito detruis la vivon de multaj esperantistoj, de poloj kaj precipe judoj. Al ili apartenis familianoj de Zamenhof kaj la „radikala esperantisto“ Izrael Lejzerowicz.

Post la milito esperantistoj denove kunhelpis iri la vojon al akordiĝo. Belan ekzemplon donis la german-pola paro Erika Rauschert kaj Roman Dobrzyński, kiuj geedziĝis en 1967 – kvar jarojn antaŭ la surgenuiĝo de Willy Brandt en la Varsovia Geto, post kio komencis pliboniĝi la politikaj rilatoj inter Pollando kaj Germanio.

D-ro Ulrich Lins (naskita en 1943) estas unu el la plej konataj Esperanto-historiistoj. Inter esperantistoj li plej konatiĝis kiel kunredaktoro de *Esperanto en perspektivo* (1974) kaj kiel aŭtoro de *La danĝera lingvo* (unua eldono en 1973). Dum multaj jaroj li kunlaboris en la estraroj de TEJO kaj UEA, kies vicprezidanto li estis inter 1989 kaj 1995. Profesie li en la Germana Akademia Interŝanĝa Servo okupiĝis pri la interŝanĝo de universitatoj inter Germanio kaj aliaj landoj. Inter alie, li starigis ties oficejon en Tokio kaj dum multaj jaroj gvidis ĝin.




Halka parolas Esperante

Roman Dobrzyński

La kontribuo „Halka parolas Esperante“ koncernas la unuan aplikon de Esperanto en la operarto. La opero *Halka* de Stanisław Moniuszko estis prezentita dum la Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo 1912. Plenumis ĝin artistoj de la Lvova Operejo. La libreton de la opero verkis la poeto Włodzimierz Wolski kaj Esperantigis ĝin Antoni Grabowski. Ĝi estis entuziasme akceptita de mil partoprenantaj kongresanoj.

La prelegon povas komenci la plej bela ario de la opero plenumita de la kantisto Jacek Parol kaj registrita dum la jubilea UK en Varsovio 1987.



Translima kunlaboro inter najbaroj – sed en kiu lingvo? ~ Kion ni povas lerni el german-polaj spertoj ~

KIMURA Goro Christoph (Tokio, antaŭe Frankfurt (Oder)/Stubice)

Por translima kunlaboro necesas lingvo por interkompreniĝi. Ekzistas diversaj rimedoj por komunikado inter personoj, kiuj parolas malsamajn lingvojn. Kio estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de unuopaj rimedoj? La german-pola landlima regiono estas aparte interesa loko por pripensi tiun demandon, ĉar ĉi tie – pro manko de ĝenerale uzebla komuna lingvo – ĉiuj logike penseblaj eblecoj estas reale observeblaj: la angla, rusa, germana, pola, soraba, diversaj kombinoj de tiuj lingvoj, kiel lingva mikrado aŭ interkomprena multlingveco, kaj ni ne forgesu Esperanton. En tiu ĉi prelego mi prezentos rezultojn el intena surloka esploro, kiamaniere la diversaj rimedoj estas konkrete uzataj en la kongresloko Frankfurt (Oder)/Stubice kaj ĉirkaŭaĵo, kaj pli ĝenerale inter germanoj kaj poloj. La komparo kun aliaj rimedoj en la sama geografio kaj socia kunteksto montros la unikajn trajtojn de Esperanto kiel pontlingvo kaj prilumos la signifon de nia transponta kongreso.

KIMURA Goro Christoph (nask. 1974)

Sophia-Universitato, Kioi 7-1, JP-102-8554 Tokio. g-kimura@sophia.ac.jp
Socilingvisto. Doktorigis 2002 ĉe Hitotsubashi-Universitato en Tokio kun tezo pri homaj intervenoj por vivteni kaj revivigi malplimultajn lingvojn. 2002–2004 docento ĉe Keio-universitato. 2004 docento ĉe Sophia-universitato. 2007 vicprofesoro. Ekde 2012 profesoro pri germana kaj eŭropaj studoj ĉe la Fakultato por Fremdaj Lingvoj kaj Studoj de Sophia-Universitato en Tokio. 2012–2013 gastesploristo ĉe la Katedro pri Lingvo-uzo kaj Lingvo-komparo ĉe la Eŭropa Universitato Viadrina en Frankfurt/Oder, kie li komencis esploron de interlingva komunikado ĉe la german-pola landlima regiono. Rilate al Esperanto kunredaktis i.a. japanlingvan enkondukan libron pri interlingvistiko (2009) kaj laste festolibron por Ulrich Lins (2018). Kontribuis al festlibroj por Blanke (2001, 2011), Tonkin (2010), Corsetti (2016) kaj al Aliroj al Esperanto (2018) k.a. Krom la japanan, parolas la germanan, polan, soraban kaj Esperanton.



Najbaraj rilatoj sur la irlanda insulo

Seán Ó Riain

Kiam oni demandis al la irlanda verkisto Samuel Beckett, kiu skribis france, ĉu li estas anglo, lia respondo estis « Au contraire! [Male!] ». Najbaraj rilatoj en Irlando komplikiĝis dum la pasintaj 800 jaroj pro enmiksiĝo de Britio – enmiksiĝo ne ĉiam bonvena! La hodiaŭa Nord-Irlanda problemoj povas esti resumita per la ekzisto flank-al-flanke de du samgrandaj – unu kun brita identeco kaj unu kun irlanda identeco. Ke la komunumoj estas kutime nomataj „protestanta“ kaj katolika“ kreas la falsan impreson, ke temas pri religia lukto. La Interkonsento de Sankta Vendreda de 1998 ŝajnis restarigi pacon. Sed la Briteliro, kontraŭata de 56 % de Nord-Irlandaj balotantoj, aldonas komplikaĵojn. Ĉu Irlando rekuniĝos? Ĉu Skotlando sendependiĝos, kaj se jes, kiel tio influos Nord-Irlandon? Kiuj estas la ebloj por pacaj najbaraj rilatoj sur la insulo de Irlando?

Seán Ó Riain estas nuntempe **Deputita Konstanta Reprezentanto** en la Irlanda Ambasado al Aŭstrio kaj la Konstanta Reprezentejo de Irlando al la Internaciaj Organizaĵoj en Vieno. Li aliĝis al la Ministrejo pri Eksteraj Aferoj septembre 1978 kaj deĵoris en Vieno (dufoje), Kanbero, Varsovio, Berlino, la Konstanta Reprezentejo de Irlando al EU en Bruselo, kaj estis dum ok jaroj pruntita nacia spertulo en la Eŭropa Komisiono. Lia doktoriĝa tezo, el TCD (Kolegio de la Triunuo, Dublino), temas pri lingvo-planado en Irlando kaj Kebekio, kaj li aparte interesiĝas pri la plifortigo de eŭropa identeco harmonie kun naciaj identecoj, kaj pri plibonigado de lingvolernado. Edziĝinta al Natalie, el Francio, liaj du filinoj, Aisling kaj Ciara, estas denaskuloj en la irlanda lingvo kaj ankaŭ parolas Esperanton.



German-polaj limtranspaŝaj fervojaj projektoj

Guido Brandenburg (Germanio)

Limtranspaŝaj fervojaj linioj ĝuas specialan intereson de la fervojaj esperantistoj – vi scias „Reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn“. La najbaroj Germanio kaj Pollando havas multajn tiajn liniojn, longdistancajn trafikarteriojn kaj regionajn interligojn, kiuj spertas tre diferencajn sortojn. Kvar ekzemploj prilumu ĝin kaj la kaŭzojn.

Rega kaj sekuriga tekniko por regionaj linioj

Guido Brandenburg (Germanio)

Sekura veturo sur la fervojaj trakoj estas esenca postulo kaj apud la daŭripovo argumento preferi tiun trafikilon. La sekurecon de fervojtrafiko ĉefe influas denseco kaj rapideco en la trakreto kaj la rimedoj eviti erarojn. Dum la reto kreskis, per la trafika regado taskitaj homoj ricevis teknikajn rimedojn, kiuj ebligis kontroli kreskantan trafikon en kreskantaj distancoj.

Simplaj regejoj avancis al centraloj kun kelkcento de konektitaj trakforkoj kaj signaliloj. Kun la komplekseco de tiuj regejoj evoluis ankaŭ la kostoj kaj leviĝis la demando, ĉu por pli simplaj trafikaj cirkonstancoj laŭ regionaj linioj vere necesas tia ĉionpova tekniko aŭ ĉu ne pli konvenas moderna sed pli modesta alternativo.

La prelego prilumas la disvolviĝojn en la regeja teknologio kaj enkondukas en la sistemon ZSB2000 por regionaj linioj.



Komercaj ŝancoj de ĉinaj lokomotivoj

WANG Tianyi Chielismo (Ĉinio)

La fervoja reto de Ĉinio mezuras 141.500 km. De ili 100.000 km estas elektrizitaj. Pro tio diversaj dizelaj lokomotivoj restas daŭre neuzataj. La ĉina landa asocio de IFEF volas trovi interesitojn pri tiuj liberaj lokomotivoj, ĉar ĝi disponas pri faksperteco kaj komercaj kontaktoj.



Tririmeda transkargadinstalaĵo de la magdeburga haveno

Manfred Trenne (Germanio)

La haveno Magdeburg estas kroĉita al la kanal- kaj rivera reto, al la fervoja reto kaj al la strata reto de Germanio. Varoj transportataj per la koncernaj trafikrimedoj sur ĝia tereno povas esti stokataj aŭ transkargataj konforme al certaj reguloj kaj konvene laŭ ilia speco. Speciala trakado necesas por danĝeraj varoj.

La prelego klarigas la teknikajn kaj sekurecajn ekipaĵojn de la transkargadinstalaĵo, kies celo estas protekti la ĉirkaŭan medion kiel aeron, teron kaj akvon.



D-ro Ernst Kliemke – respondeculo por la orientaŝtata fervojo

Roland Schnell (Germanio)

Kliemke estis berlina esperantisto, kiu kiel direktoro de la orientaŝtata fervoja kompanio en la tiama germana kolonio organizis la konstruon kaj funkcion de metroŝpura fervoja linio inter Daressalam kaj la Tanganjika-lago.

La prelego priskribas la defiojn alfrontatajn planante kaj realigante la projekton, la taskon de la linio, la rolon de Kliemke, liajn ideojn kaj viziojn.



El la nova mondo – Antonín Dvořák kaj la fascino de fervojo

Ladislav Kovář (Ĉeĥio)

Antonín Dvořák estas fama ĉeĥa komponisto el la 19-a jarcento. Dum lia vivo li komponis pli ol ducent muzikkomponaĵojn en diversaj stiloj. El liaj leteroj, rimarkoj, kaj el memoraĵoj de liaj samtempuloj estas konate, ke li intense interesiĝis pri fervojo kaj teknika evoluo.

En la prelego estas koncize priskribita lia vivo, la plej gravaj muzikverkoj kaj memoraĵoj, kiuj dokumentas lian amon – fervojon kaj lokomotivojn.



Akcidentoj kaj epizodoj – poŝvagonoj kaj duonremorkoj

Jan Niemann (Danio)

La maniero transporti duon-remorkojn trajne per poŝvagonoj estas adaptita de ŝarĝaŭtoj. Sed estas grada diferenco – la ŝarĝaŭta ŝoforo tuj rimarkas nestabilecon – ne eblas por lokomotivestro senti tion, kiam li veturas kun eble 30 duon-remorkoj en la vico. Ankaŭ la ĉe ŝarĝaŭto dinamika rekta rado-vojo-konekto de la duon-remorko, kiu ne ekzistas, kiam duon-remorko estas statike fiksita en poŝvagono ĉe trajno, influas.

Ni prezentas teknikajn kaj aliajn cirkonstancojn, kiuj kaŭzis plurajn, unu eĉ tre gravan, akcidentojn kaj pri la streboj eviti ilin.



160 jaroj de fervojoj en Kroatio – ĉefaj detaloj el koncerna historio (I.)

Zlatko Hinšt (Kroatio)

Komence dum la aŭstro-hungara monarkio tra ĉiuj ŝtataj strukturoj sekvintaj ĝis la hodiaŭa Kroatio la fervojo ludis esencan rolon en la soci-ekonomia disvolviĝo de la lando. Ĝi ebligis modernigon, akcelis industriigon kaj spronis urbanizadon. Jam la unua linio de la hungara Nagykanizsa tra la nordo de Kroatio tuŝante Ĉakovec kaj Kotoriba ĝis la slovena Pragersko post sia inaŭguro 1860 kroĉis la landon al la kreskanta eŭropa reto. La fervojaj linioj avancis al arterioj de ekonomia evoluo.



Renesanco de noktaj trajnoj

Andreas Diemel (Germanio)

Noktaj trajnoj dum multaj jardekoj estis grava elemento de la fervoja mondo. Dum la pasinta jardeko la oferto pli kaj pli malaltiĝis kaj malgraviĝis. Depost kelkaj jaroj la Aŭstra Federacia Fervojo ÖBB ofertas regulan kaj konvenan noktan trafikon en mezeŭropo.

La prelego montru la evoluon, la nunan staton kaj planojn por la estonteco. Krome ĝi priskribas la vagonaron, la horaron kaj la interligon. Ankaŭ aliaj gravaj noktaj trajnkonektoj estas prilumataj.



Fervojtrafiko translima inter Ĉeĥio kaj Pollando

Jaroslav Matuška (Ĉeĥio)

Prezentataj estas fervojstacioj landlimaj kaj fervojlinioj, kiuj interligas la Ĉeĥan Respublikon kaj Pollandon. La fervojlinioj estas karakterizataj pere de elektitaj parametroj kiel jaro de (re-)malfermo, nombro de pasaĝertrajnoj (laŭ la horaro 2020), trakcio (elektra, dizela), rapideco maksimuma sur liniosekcio k.s.

La prelego prezentas la rezultojn de seminaria laboraĵo de studento dum la varbado por IFEF en la Transportfakultato de la Universitato Pardubice.

Tagordo de publika komitatkunveno

en la 72-a IFEF-kongreso en Frankfurt/O (DE) –
 Stubice (PL) (21./24.05.2021) (aŭ rete)

1. Malfermo, konstato de la mandatoj
2. Ricevitaj telegramoj, leteroj
3. Honorigo de la mortintoj
4. Estraranaj raportoj
 - 4.1. Sekretario
 - 4.2. Redaktoro
 - 4.3. Kasisto
5. Diskuto kasraporto-bilanco 2020/
 buĝeto 2022, kotizkonfirmo
6. Protokoloj IFK reta
7. Raporto de la ĉefkomitatano
8. Resumo de la jarraportoj 2020 el la landaj
 asocioj
9. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)
 - 9.1 Gvidanto
 - 9.2 Sekretario Fake Aplika Sekcio (FAS),
 Terminara Sekcio (TS)
 - 9.3 Eleko de gvidanto kaj sekretarioj
 ene de FK
10. Raportoj de la komisiitoj
 - 10.1 Komitatano „A“ de IFEF ĉe UEA
 - 10.2 Fakdelegitoj de UEA
 - 10.3 Rilatoj al aliaj organizoj: FISAIC; SAT;
 ILEI; UMEA; ISAE; TAKE; IFEF
11. Kongresproponoj
 - 11.1 Eleko de la ĉefkomitatano kaj
 anstataŭanto de Ĉk
12. Analizo pri la situacio kaj la estonto
 de IFEF
 - 12.1 Raportoj de la laborgrupoj
 - 12.2 Strategia laborplano
 - 12.3 Situacio en kelkaj landoj
13. Venontaj kongresoj
 - 13.1 Konfirmo de la invito al la 73-a IFK en
 2022 en Ĉeĥio
 - 13.2 Eleko de la lando por la 74-a IFK en
 2023 (Belgio)
 - 13.3 Diskuto pri pluaj eblecoj: 2024, 2025
14. Eventualaĵoj
15. Libera diskutado

Vito Tornillo, sekretario de IFEF

Tagordo por la kunveno de FK dum la 72-a kongreso

1. Bonvenigo kaj enkonduko
 fare de la FK-gvidanto.
2. Elektoj:
 - a) Gvidanto de FK (nuna Jan U. NIEMANN,
 ne deziras reelekton).
 - b) Sekretario de FAS
 (nuna Jaroslav MATUŠKA, reelekteblas).
 - c) Sekretario de TS
 (nuna Guido BRANDENBURG, reelekteblas).
 - d) Redaktoro de TeKu
 (nuna Guido BRANDENBURG, reelekteblas).
3. Raporto de la Fake aplika sekcio-sekretario.
4. Raportoj pri faka laboro
 en unuopaj IFEF landaj asocioj.
5. Fakaj programeroj dum la 72-a IFK.
6. Raporto pri la Terminara (sekcia) laboro.
7. Raportoj de la TS-kunlaborantoj
 (kaj landaj kaj individuaj).
8. Trakto de nocioj laŭ informoj
 en Terminaraj Kurieroj.
9. Fakaj programeroj dum la 106-a UK
 en Belfasto.
10. Novaj taskoj por la sekcioj.
11. Eventualaĵoj (sub tio korektado
 de la adreslisto).

Jan Niemann, gvidanto de Faka Komisiono

IFEF?

Kio estas IFEF?

La Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), starigita en la jaro 1909, estas fervojista asocio de esperantistoj celanta kunigi pere de la internacia lingvo diversfakajn profesiulojn de ĉiuj branĉoj de fervojo kaj transportado kaj amikojn de fervojo en la tuta mondo.



IFEF ofertas forumon por

- interŝanĝi konojn kaj spertojn kun alilingvaj gekolegoj cele kontribui al la ĝenerala kaj faka kultura klerigo
- apliki kaj pluevoluigi Esperanton kiel fervojfakan lingvon
- renkontiĝi kun geamikoj en internaciaj aranĝoj
- lerni Esperanton

Agado de IFEF

- Ĉiujara internacia kongreso kun faka, turisma kaj kultura programo
- Ilustrita „Internacia Fervojisto“ (IF) – revuo inkluzivita en la membreco
- „Fervojfakaj kajeroj“ – kolektoj de la plej signifaj diverstemaj prelegoj aperintaj ankaŭ en Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB)
- „RailLexic“ – Esperanto-sekcio de fervoja terminaro de UIC (Internacia Fervoja Unio), kiu enhavas terminojn en 23 lingvoj
- Staĝoj enlandaj kaj internaciaj por komencantoj kaj progresantoj, kunlabore kun ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)
- La IFEF-devizo estas: „La relo ligas la landojn, Esperanto la popolojn“
- La federacio kunigas landajn asociojn, individuajn membrojn kaj amikojn de fervojo en pli ol 25 landoj

Revuo: Internacia Fervojisto

Reta informilo: El fervoja mondo

Kolekto: Fervojfakaj kajeroj

Se vi estas interesita, ni invitas vin membriĝi en IFEF (ĉu fervojisto, ĉu nefervojisto!)

Eĉ sen membriĝo ni atendas de vi rakontojn pri viaj spertoj dum trajnvojaĝoj, informojn pri fervojo aŭ alispeca transporto en via lando aŭ regiono, pri trafiko moderna aŭ per nostalgiaj trajnoj.

Ne hezitu kaj skribu! Ni estas malferma organizo.

Se vi deziras kontakti nin, bonvolu retroŝte ĉe:

ifefesperanto@gmail.com

www.ifef.net

www.facebook.com/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio-726039834155372/

Akademio Internacia de la Sciencoj

Prof Amri Wandel
Prezidanto



Mesaĝo por SUS37

Okaze de la GEA-PEA-IFEF-kongreso

Karaj kongresanoj,

por Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) la koronaviruso havis en 2020 du gravajn efikojn: oni nuligis la GEA-IFEF-PEA-kongreson, en kies kadro devus okazi SUS37. Due la 73-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) okazis unuafoje **defore**, kadre de la unua Virtuala Kongreso (VK), al kiu aliĝis ĉ. dumil personoj el pli ol 90 landoj. Unuafoje okazis virtualaj **ekzamenoj** fine de la IKU-AIS-kursoj, same okazos virtuala AIS-ekzameneto fine de unu el la tri AIS-SUS-prelegoj dum la nuna kongreso („Nigraj truoj“ de Amri Wandel). La aliaj du temoj pri lingvoj (Ida Stria) kaj fabeloj (Anna Striganova).



En 2021, same kiel en 2020, la IKU-AIS-libro aperos rete kaj estos senpage elŝutebla. Temas pri kolekto de tekstoj de la IKU-AIS-prelegoj, eldonata ĉiujare ekde 1998. La retaj IKU-libroj estas haveblaj en la IKU-paĝo de UEA: <https://uea.org/teko/IKU/>. Ĝi aperos ankaŭ ĉi-jare rete kaj papere, kaj enhavos la tekstojn de la tri SUS-prelegoj okazantaj dum tiu-ĉi kongreso, kaj de aliaj 12 prelegoj okazantaj en la venonta IKU-AIS-sesio, kadre de la **dua Virtuala Kongreso** en julio: ok IKU-prelegoj, el ili 4 estos samtempe ankaŭ AIS-kursoj, kaj aldone 4 prelegoj de la Scienca Kafejo. Iliajn resumojn eblas vidi en <https://uea.org/teko/IKU/2021>.

Unuafoje en la historio de AIS la nomo „SUS“ kaj la AIS-atestoj ne surhavas la nomon „San Marino“. SUS nun signifas „**Scienca** Universitata Sesio“. Post 35 jaroj AIS decidis likvidi sian juran personecon

en San Marino, kio reflektas la efektivan situacion: la sanmarinaj instancoj jam de longe ne interesiĝas pri AIS. Jam de pli ol dek jaroj la ĉefa agado de AIS okazas ne en universitatoj sed lige al Esperanto-kunvenoj, ĉu la UK, ĉu aliaj regionaj kunvenoj kiel BET kaj la Itala Kongreso.



Nigraj truoj kaj gravitaj ondoj – Amri Wandel

Ambaŭ tiuj ekzotaj fenomenoj antaŭviditaj de la Ĝenerala Teorio de Relativeco de Einstein, estis dum multaj jaroj konsiderataj kiel matematikaj kuriozaĵoj, ne vere ekzistantaj en la reala mondo. Eĉ Einstein mem dubis pri la reala ekzisto de tiuj du fantastaj kaj malfacile percepteblaj manifestiĝoj de sia teorio. Nigraj Truoj estis malkovritaj de astronomoj antaŭ ĉ. kvindek jaroj, gravitaj ondoj antaŭ kvin jaroj, en septembro 2015 (Nobelpremio pri fiziko 2017) kaj la giganta nigra truo en la centro de nia Galaksio – en 1995 (Nobelpremio pri fiziko 2020). Ni lernos, kio efektive estas nigraj truoj, kiel ili estas ligitaj al gravitaj ondoj, kaj kiaj enigmaj malkovroj okazis en la lastaj jaroj pri tiuj du fenomenoj.

Prof. Amri Wandel estas profesoro pri astrofiziko en la Universitato de Jerusalemo. De kvar jardekoj li esploras nigrajn truojn kaj aktivajn galaksiojn. Prezidanto de la Israela societo por Astrobiologio kaj membro de Internacia Astronomia Unio. Liaj esploroj pri gigantaj nigraj truoj kaj kvazaroj kaj aktivaj galaksioj estas internacie konataj kaj aperis en la plej prestiĝaj astrofizikaj sciencaj revuoj. En Esperantujo li estas Akademiano, UEA-estrarano pri Scienca kaj Faka Agado kaj prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj.

Ekzameno: En la ekzameno, kiu sekvis la prelegon, partoprenis entute 22 personoj. Premion por la plej bona rezulto (9 el 10 poentoj) ricevis Robert Kamiński el Pollando. Honoran mencion ricevis Petra Gabert el Germanio: ŝi nur antaŭ tri monatoj eklernis Esperanton, sed atingis 8 poentojn en la ekzameno. Diplomojn krome ricevis Kristan Ostoj, Konrad Fischer, Raphael Das Gupta, Fritz Wollenberg kaj Sebastien Montagne.



La nord-ĝermanaj lingvoj: karakterizaĵoj, deveno kaj vario – Ida Stria

La prelego donas superrigardon pri la nordĝermanaj/nordiaj lingvoj (t.e. la islanda, la feroa kaj la skandinaviaj lingvoj). La celo estas prezenti iliajn originon, varion kaj ĉefajn trajtojn kaj grupinternajn diferencojn en historia perspektivo. Ni parolos pri ilia ekesto ekde la praĝermana, kiu disiĝis de hindeŭropaj lingvoj, tra la pranordia lingvo, ĝis ilia interna divido, kies ŝanĝiĝoj ni ŝpuros tra la tempo el fonologia, morfologia kaj sintaksa vidpunktoj. Sekvos analizo de interkompreno de najbaraj skandinaviaj lingvoj.

Ida Stria estas doktoro pri aplikata lingvistiko kun specialiĝo pri interlingvistiko (2016). Ŝi magistriĝis pri etnolingvistiko kaj pri la sveda lingvo kaj diplomiĝis pri interlingvistiko en Poznań, Pollando. Ŝi laboras en la Universitato de Varsovio, Pollando, kie ŝi instruas la svedan lingvon kaj esploras Esperanton enkadre de kultura lingvistiko kaj socilingvistiko.



Fabeloj pri li. Fabeloj pri ŝi. Serio el du prelegoj – Anna Striganova

Kiam *li* regis en antikvaj fabeloj, regado lia estis ora, kiel la suna regado, bonfartis homoj ĉirkaŭ li kaj morto mem forkuris en timo subteren. Kiam en antikvaj fabeloj regis *ŝi*, socia utilo kaj moralo paliĝis antaŭ ŝia romantika amemo kaj aperis en mondo la unuaj historioj, kie amo estis pli grava ol vero. Ŝanĝiĝis fabeloj, ŝanĝiĝis roloj de li kaj ŝi. Foje, kadre de sociaj historiaj ŝanĝoj, ili proksimiĝis kaj similis unu la alian, foje disiĝis tiel, ke abismon de nekomprene inter li kaj ŝi poetoj komparis kun abismo inter infero kaj paradizo. Sed tamen ĉiam oni rankontis fabelojn. Pri li. Pri ŝi. Kaj plej feliĉan, sed tiel maloftan – pri ili ambaŭ.

Anna naskiĝis en Moskvo, en 1987. Esperantiĝis en 2008. Ŝi estas bakalaŭro pri ĵurnalismo, magistro pri filologio, laboras ĉe filologia fakultato de Rusia universitato de amikeco de popoloj (RUDN), okupiĝas pri esploroj de literaturo, mitoj kaj fabeloj, estas aŭtoro de pluraj sciencaj artikoloj. Anna verkas ankaŭ beletron en la rusa kaj origine en Esperanto. Ekde aprilo 2017 ŝi iĝis kunredaktoro de la revuo „Esperanto“. Anna ofte prelegas en Esperanto kaj en la rusa dum sciencaj konferencoj, Esperanto-renkontiĝoj kaj Lingvaj Festivaloj.



Varsovia Vento

Irek Bobrzak

Kiam iu el inter la esperantistoj aŭdas „Varsovia Vento“, plej ofte rekonas ĝin kiel nomo de la interreta sendependa radio forme de podkasto. Malmultaj tamen scias, ke Varsovia Vento ne signifas nur la radio-agadon. Tiu nomo signifas ankaŭ homojn, instruadon de Esperanto, organizadon de diversaj internaciaj eventoj kaj aranĝoj, kaj realigadon de multaj aliaj projektoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ podkasto. Kio do verdire signifas la nomo? Se vi interesiĝas – bonvenon dimanĉe, inter la 15:15 kaj 16:00 horoj, por iom pli amplekse aŭskulti pri Varsovia Vento.

Irek (Ireneusz) Bobrzak, polo, varsoviano, en 1991 fondinto de Varsovia Vento-klubo, -agado kaj -podkasto, organizanto kaj kunorganizanto de multaj internaciaj eventoj, i.a. iamaj AS-oj (Ago-Semajno), la 61-a IJK en 2005, kunorganizanto de pluraj aliaj internaciaj eventoj kaj renkontiĝoj, unu el la ĉefaj fondintoj kaj ĉeforganizantoj de JES (la novjara Junulara Esperanto-Semajno), ĉefa redaktoro de Varsovia Vento-Elsendoj, la internacia reta radio forme de podkasto, kiu prezentas siajn primovadajn kaj prikulturajn programojn ekde 2006 ĝis nun, entuziasma ĝardenumanto.

Botanika terminaro

Irek Bobrzak

Ekde komenco, la movado esperantista frontas klopodon plenumi la lingvon ankaŭ pere de la fakaj vortaroj. Matematiko, fiziko, kemio, astronomio, medicino, elektroniko, informatiko kaj multaj aliaj. Inter ili botaniko tre gravas, por ke la lingvo estu preta, kiam venos la ĝusta tempo. Se temas pri la kampo, la tasko evidentiĝis tro ampleksa. Ja, se oni parolas pri plantoj, oni devas scii, ke al ili apartenas 17020 genroj kun centoj da specioj kolektitaj en 642 familioj. Jes, ne ĉiu bezonas tiun scion, tamen parolante pri faka studado en Esperanto oni ne evitos la vortaron, ĉu? Kia estas nun stato, se temas pri la vortaro de plantoj. Ĉu la temo evoluas aŭ stagnas. Kie oni povas trovi utilajn vortarojn por tiuj, kiuj interesiĝas ekzemple pri ĝardenumado. Al tiuj kaj al la aliaj demandoj respondon trovos vi dum la dimanĉa renkontiĝo inter 16:00 kaj 16:45 horoj dum prelego de Irek Bobrzak pri la botanika terminaro. Bonvenon!



Esperanto-stacio Halbe hodiaŭ

Ralf Fröhlich

La Esperanto-stacio estas domo por kursoj kaj aktivaĵo en kaj pri Esperanto kaj regiona kultura centro en la vilaĝo de Halbe ĉe Berlino. Ĝi funkcias en eksa stacidomo. Dum la kronvira tempo estis malmultaj aktivaĵoj, sed okazis kaj okazas granda renovigo. En la prezento vi ekscios pri la nuna stato de la laboroj kaj niaj ankoraŭ preskaŭ sekretaj planoj pri artaj, lingvaj, teatraj kaj videoludaj aktivaĵoj. Vi ankaŭ vidos iom de la foto-ekspozicio, kiu okazas samtempe.



Amikumu

Chuck Smith

Amikumu estas grava apo (telefon-aplikaĵo), kiu ebligas, ke esperantistoj facile povu trovi aliajn esperantistojn proksime. Post kiam oni instalas ĝin, oni povas vidi la 100 plej proksimajn esperantistojn, mesaĝi al ili kaj aranĝi rendevuon. Nun en kronviro tempo, ĝi gravas, ĉar en multaj lokoj en la mondo, oni rajtas renkonti nur unu homon samloke, do per Amikumu eblas pluhavi esperantistan komunumon eĉ se ne eblas renkontiĝi grupe ekster la interreto. Ankaŭ eblas ekzerci multegajn aliajn lingvojn per Amikumu. Sciu kiel Amikumu nun statas, kiel homoj uzas ĝin kaj kiujn planojn ni havas por la estonto.

Chuck Smith estas usonano, kiu ekde 2008 loĝas en Berlino. Li estas pioniro en la reta Esperanto-movado. Inter aliaj aktivaĵoj li estas la fondinto de la Vikipedio, kunfondinto de la kurso de Duolingo por Esperanto. Nuntempe li laboras kiel la Ĉefa Teknika Oficisto de Amikumu kun ĉefa tasko grand-skale renovigi la tutan apon.

amikumu
Ekzercu lingvojn apude

Ni subtenas 7.000+ lingvojn inkluzive de la kataluna, ĉina, nederlanda, Esperanto, irlanda, japana, okcitana, pola, portugala, rusa, Tokipono kaj kimra, kaj ĉiuj SENPAGE! Ankaŭ ni subtenas 100+ signolingvojn kiel ASL kaj Ozlanon.

GET IT ON
Google Play

Download on the
App Store



Ekskursu tra Berlino kaj renkontu kulturojn de la mondo

Fritz Wollenberg (*1948) estas pedagogo kaj urbogvidanto en Berlino. Kiel studento en 1966 li lernis Esperanton. Aperas ekde 1984 liaj publikigaĵoj pri historio de Esperanto, inter alie la libroj „Esperanto – lingvo kaj kulturo en Berlino – 100 jaroj“ (2006) kaj „Esperanto – lingvo kaj kulturo en Berlino kaj Brandenburgio – 111 jaroj“ (2017) ĉe la eldonejo Mondial.



Tion vi estus vidintaj: bildprelego pri Frankfurt (Oder)

Ronald Schindler naskiĝis 1959-07-07 en Weimar. Li transloĝiĝis al Templin dum januaro 1966, kie li frekventis diversajn lernejojn. En la Popola Altlernejo en Templin li eklernis Esperanton en la jaro 1977.

Li studis fiŝmastrumadon en Berlino (Universitato Humboldt) kaj pro tio venis al Frankfurt (Oder) en 1984, kie origine estis planita la German-Pola-Fervojista Kongreso TRAKO 2020, kiu estis prokrastita al 2021 kaj nun okazas virtuale, kaŭze de la pandemia situacio pro la kronviruso.

Post komenca laboro en la loka fiŝfabriko de Frankfurt (Oder) Ronald Schindler ŝanĝis sian laborlokon al medioprotektado. Nuntempe li laboras en la ŝtata oficejo pri medioprotektado de la federacia lando Brandenburgio en la sekcio pri teknika medioprotektado.

Post la transloĝiĝo al Frankfurt (Oder) Ronald Schindler okupiĝis pri la loka Esperanto-movado, sisteme ankoraŭ parto de la Kulturligo de GDR, i.a. kiel instruanto. Li nun ankaŭ ofertas Esperanto-kursojn en la Popola Altlernejo de Frankfurt (Oder) kaj nuntempe estas prezidanto de la Esperanto-Ligo Berlin-Brandenburgio.

Kontakto: ronaldschindler@web.de

Bonvenon! Vi mendas – mi sendas

Esperanto-Buchversand

Libroservo de Germana Esperanto-Asocio

Esperanto-Buchversand, fondita 1999 en Majenco de Wolfgang Schwanzer, provizas klientojn en Germanio, Europa Unio kaj en multaj aliaj landoj de la mondo per literaturo en kaj pri la internacia lingvo Esperanto.

La ofertoj inkluzivas originale en Esperanto verkitajn tekstojn, tradukojn de la konata monda literaturo kaj ankaŭ porinfanajn librojn, krimromanojn kaj fakajn librojn.

Esperanto-Buchversand funkcias ankaŭ kiel libroservo de Germana Esperanto-Asocio kaj kutime prezentas librojn dum kongresoj. Okaze de la ĉijare reta transponta kongreso Esperanto-Buchversand ankaŭ ofertas siajn librojn al ĉiuj kongresanoj rete kaj kun kongresa rabato de 10%.

Kongresanoj povas mendi kiel kutime per la retvendejoj www.esperanto-buecher.de aŭ www.esperanto-buchversand.de. Post kontrolo de la kongresaneco la prezoj por la libroj en la fakturo reduktiĝos laŭ la rabato.

La rabato validas nur por kongresanoj laŭ la listo de la partoprenantoj kaj nur por mendoj dum la kongresaj tagoj (21.–24.5.2021). Rabato ne eblas por libroj de germanaj eldonejoj pro la leĝe fiksita prezo por libroj. Intertempe elĉerpitaj titoloj estos liverataj poste.

Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, 55129 Mainz
Mendo @esperanto-buecher.de



Germana Esperanto-Asocio (GEA) **Deutscher Esperanto-Bund (DEB)**

estas registrita asocio fondita 1906 kun sidejo en Berlin, kies celo estas la subteno de Esperanto en Germanio. Ĝi eldonas dumonate la membrogazeton „Esperanto aktuell“ kaj aranĝas ĉiujare la Germanan Esperanto-Kongreson kutime dum la pentekostaj tagoj GEA havas junularan branĉon Germana Esperanto-Junularo (GEJ), landajn ligojn kaj lokajn grupojn kaj estas germana landa asocio de la Universala Esperanto-Asocio (UEA). GEA laboras kun diversaj fakaj organizaĵoj, i.a. la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA).



Pola Esperanto-Asocio (PEA) **Polski Związek Esperantystów (PZE)**

estas la Esperanto-Asocio de Pollando, fondita 1908 kiel Pola Esperanto-Societo. Ĝi eldonas la dumonatan revuon „Pola Esperantisto“ kaj aranĝas ĉiujare en frua somero la Polan Esperanto-Kongreson. PEA havas junularan sektion Pola Esperanto-Junularo (PEJ) kaj dek kvin regionajn filiojn. Ĝi estas pola landa asocio de la Universala Esperanto-Asocio (UEA).

vendredo 21.05.2021			sabato 22.05.2021			dimanko 23.05.2021			lundo 24.05.2021		
A	B	C	A	B	C	A	B	C	A	B	C
09:30			09:30			09:30			09:30		
09:45			09:45			09:45			09:45		
10:00			10:00			10:00			10:00		
10:15			10:15			10:15			10:15		
10:30			10:30			10:30			10:30		
10:45			10:45			10:45			10:45		
11:00			11:00			11:00			11:00		
11:15			11:15			11:15			11:15		
11:30			11:30			11:30			11:30		
11:45			11:45			11:45			11:45		
12:00			12:00			12:00			12:00		
12:15			12:15			12:15			12:15		
12:30			12:30			12:30			12:30		
12:45			12:45			12:45			12:45		
13:00			13:00			13:00			13:00		
13:15			13:15			13:15			13:15		
13:30			13:30			13:30			13:30		
13:45			13:45			13:45			13:45		
14:00			14:00			14:00			14:00		
14:15			14:15			14:15			14:15		
14:30			14:30			14:30			14:30		
14:45			14:45			14:45			14:45		
15:00			15:00			15:00			15:00		
15:15			15:15			15:15			15:15		
15:30			15:30			15:30			15:30		
malfermo, salutvortoj, enkonduko SUS			Pol-germana interproksimiĝo: La kontribuo de esperantistoj			Goro Kimura Translingva kunlaboro inter najbaroj - sed en kiu lingvo?			Ronald Schindler Frankfurt (O): Tion vi estus vidintaj		
Ulrich Lins			Fluta interludo de Marek Nahajowski			SUS III Anna Striganova Fabeloj pri li - hodiaŭ (kun elz.)			Zofia Śmiesiek Benkontiĝo de Mazowiecki kaj Kohl en Stubice		
Roman Dobrzyński La opero Halka			Invito al 73-a IFK Beroun (CZ)			Invito al 99-a GEK Oldenburg (DE)			Invito al 73-a IFK Beroun (CZ)		
Fluta interludo de Marek Nahajowski			Seán Ó Riain Najbaraj rilatoj sur la irlanda insulo			Ferna diskuto Ĉu utilas virtualaj kongresoj?			Ferna diskuto Ĉu utilas virtualaj kongresoj?		
SUS I Amri Wandel Nigraj Truoj kaj gravitaj ondoj (kun ekzameno)			paŭzo			paŭzo			paŭzo		
GEA respondas Esperanto aktuell			PEA respondas			IFEK Komitat- kunsido			IFEK Komitat- kunsido		
Manfred			Irek Bobrzak Warszawa								

25

Transponta · reta · Kongreso (germana · pola · fervojista, 21.–24.05.2021)

(ĉiuj horoj indikitaj laŭ centra eŭropa somera tempo)

- A salono A
- B salono B
- C salono C
- Ĉs ĉefsalono

Vendredo, 21-a de majo 2021

- 19:00 h Kongresejo malfermita
- 19:30 h – 20:00 h Ĉs Komenco de la publika parto alirebla por ĉiuj kongresanoj, teknika enkonduko
- 20:00 h – 20:30 h Ĉs Kanzonoj de ĴeLe (Ĵenja kaj Lena)
- 20:30 h – 22:00 h Ĉs Muzikvespero kun Jonny M.

Sabato, 22-a de majo 2021

- 09:30 h Kongresejo malfermita
- 10:00 h – 10:45 h Ĉs Oficiala inaŭguro fare de la tri asocioj, salutvortoj, enkonduko SUS
- 10:45 h – 11:45 h Ĉs Prelego de Ulrich Lins:
„Pol-germana interproksimiĝo: la kontribuo de esperantistoj“
- 11:45 h – 12:00 h Ĉs Fluta interludo de Marek Nahajowski
- 12:00 h – 13:00 h Ĉs Prelego kaj prezento de Roman Dobrzynski: „La opero Halka“
- 13:00 h – 13:15 h Ĉs Fluta interludo de Marek Nahajowski
- 14:00 h – 15:00 h Ĉs Prelego de Amri Wandel (SUS I, kun ekzameno): „Nigraj truoj kaj gravitaj ondoj“
- 15:15 h – 16:45 h A Renkontiĝo de kaj kun Duolingo-lernintoj; gvidas Michael Vrazitulis, GEJ
- B Przemysław Wierzbowski: „Kien iras nia literatur-merkato?“ Paneldiskuto pri Esperanto-eldonado
- C Fervojaj fakprelegoj bloko I – detalojn vidu sur la venonta paĝo
- 17:00 h – 18:30 h A asembleo de Eŭropa Esperanto-Unio
(nepublika: nur por membroj de la asembleo kaj EEU-estraranoj)
- B Katarzyna Lewończuk prezentas librojn eldonitajn en Białystok
- C IFEF Faka Komisiono
- 20:00 h – 20:30 h Ĉs Kanzonoj de Georgo Handzlik
- 20:30 h – 22:00 h Ĉs Muzikvespero kun la Frey-Lech-Trio el Białystok

Dimanĉo, 23-a de majo 2021

- 09:30 h Kongresejo malfermita
- 10:00 h – 11:30 h Ĉs Prelego de Goro Kimura: „Translima kunlaboro inter najbaroj – sed en kiu lingvo?“
- 11:45 h – 13:00 h Ĉs Prelego de Seán Ó Riain: „Najbaraj rilatoj sur la irlanda insulo“
- 14:00 h – 15:00 h A estraranoj de GEA kaj redaktoroj de Esperanto *aktuell* respondas
- B PEA respondas, Pola Esperantisto
- C Publika komitatkunsido de IFEF
- 14:00 h – 16:00 h A Kunveno de Esperanto-verduloj; gvidas Manfred Westermaier
- 15:15 h – 16:45 h B Irek Bobrzak informas pri „Varsovia vento“
- 15:15 h – 16:00 h B Prelego de Irek Bobrzak pri „Botanika terminaro“
- 16:00 h – 16:45 h B Prelego de Irek Bobrzak pri „Botanika terminaro“
- 16:15 h – 17:45 h C Fervojaj fakprelegoj bloko II – detalojn vidu sur la venonta paĝo

- 17:00 h – 17:45 h **A** Kunveno de AGEI/ILEI, informoj el Herzberg; gvidas Zsófia Kóródy
- 17:00 h – 17:45 h **B** Prezento de „Amikumu“; gvidas Chuck Smith
- 18:00 h – 19:30 h **A** Prelego de Ida Stria (SUS II, kun ekzameno):
„La nordĝermanaj lingvoj: karakterizaĵoj, deveno kaj vario“
- 18:00 h – 19:00 h **B** Bildprelego de Fritz Wollenberg:
„Ekskursu tra Berlino kaj renkontu kulturojn de la mondo“
- 18:00 h – 19:30 h **C** Fervojaj fakprelegoj bloko III – detalojn vidu ĉi-sube
- 20:00 h – 20:30 h **Ĉs** Rok-koncertas JoMo
- 20:30 h – 22:00 h **Ĉs** Muzikvespero kun Kĵara

Lundo, 24-a de majo 2021

- 09:30 h Kongresejo malfermita
- 10:00 h – 10:45 h **A** Bildprelego de Ronald Schindler: „Frankfurt (Oder): tion vi estus vidintaj“
B Prelego de Zofia Śmistek: „La renkontiĝo de Tadeusz Mazowiecki kaj Helmut Kohl en Stubice“
C IFEF-diskuttrondoj
- 11:00 h – 12:00 h **A** Prelego de Anna Striganova (SUS III, kun ekzameno):
„Fabeloj pri li – fabeloj pri ŝi“
B Prezento de Ralf Fröhlich: „La Esperanto-stacio Halbe hodiaŭ“
C Invito al 73-a IFK de IFEF (Beroun, CZ)
Invito al 99-a GEK de GEA (Oldenburg)
- 12:15 h – 13:00 h **Ĉs** Ferma diskuto: „Ĉu utilas virtualaj kongresoj?“

Fervojaj fakprelegoj (IFEF)

ĉiuj en salono C

Sabato, 22-a de majo 2021 – bloko I

- | | | |
|-------------------|-----------------------|---|
| 15:15 h – 15:30 h | Jan Niemann | Akcidentoj kaj epizodoj – poŝvagonoj kaj duonremorkoj |
| 15:30 h – 15:45 h | WANG Tianyi Chielismo | Komercaj ŝancoj de ĉinaj lokomotivoj |
| 15:45 h – 16:15 h | Manfred Trenne | Tririmeda transkargadinstalaĵo de la magdeburga haveno |
| 16:15 h – 16:45 h | Roland Schnell | D-ro Ernst Kliemke – respondeculo por la orientaŝtata fervojo |

Dimanĉo, 23-a de majo 2021 – bloko II

- | | | |
|-------------------|-------------------|--|
| 16:15 h – 16:35 h | Jaroslav Matuška | Fervojtrafiko translima inter Ĉeĥio kaj Pollando |
| 16:35 h – 17:05 h | Guido Brandenburg | Reĝa kaj sekuriga tekniko por regionaj linioj |

Dimanĉo, 23-a de majo 2021 – bloko III

- | | | |
|-------------------|-------------------|--|
| 18:00 h – 18:15 h | Ladislav Kovář | El la nova mondo – Antonín Dvořák kaj la fascino de fervojo |
| 18:15 h – 18:30 h | Guido Brandenburg | German-polaj limtranspaŝaj fervojaj projektoj |
| 18:30 h – 19:00 h | Zlatko Hinš | 160 jaroj de fervojoj en Kroatio – ĉefaj detaloj el koncerna historio (I.) |
| 19:00 h – 19:30 h | Andreas Diemel | Renesanco de noktaj trajnoj |

Sabatmatenaj intermezoj



Marek Nahajowski

Marek Nahajowski (naskita 1979) estas muzikteoriisto kaj muzikisto ludanta kopiojn de historiaj blovinstrumentoj (bekfluto, ŝalmo). Li diplomitiĝis kun distingoj en muzikteorio (Lodzo 2003) kaj bekfluto en la klaso de Tomasz Dobrzański (Wroclavo 2007); ekde 2010 li laboras kiel adjunkto en la Kate-dro de Muzikteorio ĉe la Grażyna kaj Kiejstut-Bacewicz-Muzikakademio en Lodzo (Pollando), kie li instruas pri historio, muzikteorio kaj koncertpraktiko de la renesanca kaj baroka muziko; ekde 2011 li gvidas ankaŭ la bekflutan klason. En 2013 li gajnis por sia libro pri flutsonatoj de Johann Joachim Quantz la ĉefpremion en la prestiĝa Ks. Prof. Hieronim Feicht Konkurso.

Li habilitiĝis en 2019 per disertaĵo pri la 18-jarcenta muzikhistoriografio.

La sciencaj interesiĝoj de Marek Nahajowski koncentriĝas je muzikhistorio de la renesanca kaj baroka periodoj, je la tiama koncertado, hermeneŭtika interpretado de kantverkoj kaj – ekde 2019 – je la Esperanta muzikkulturo. Kiel muzikisto li ludplenumis kun multaj polaj ensembloj pri malnova muziko, i.a. Il Tempo, ArsCantus, Concerto Polacco, Filatura di Musica. Li publikigis du solistajn albumojn dediĉitajn al flutfantazioj de Georg Philipp Telemann (RecArt 0009) kaj Suitoj op. 35 de Joseph Bodin de Boismortier (RecArt 0026).

Muzikaj vesperoj



ŴeLe

La duopon ŴeLe konsistigas **Ĵenja Wilke** (voĉo, violono, gitaro, ukulelo, metalofono i.a.) kaj **Lena Wilke** (voĉo, piano, gitaro i.a.), filino kaj patrino el Schwedt (Brandenburgio).

Siajn kantojn ili verkas mem plejparte, aliaj fontas el ukraina popolkulturo.

La familia duopo, profesia muzikisto kaj studento pri muziko, ekzistas de 2009 kaj koncertas dum diversaj esperantaj aranĝoj. Ili plejparte kreas lirikajn, jen melankoliajn, jen ĝojajn kantojn, kun fojaj ĵazecaj emoj aŭ influataj de la slavaj stiloj. Sian trian albumon *En Esperantujo* ili prezentis dum la 6-a JES en Weißwasser (2014–15), kun aŭdacaj, pli rapidaj aŭ pezaj ritmoj, kiel ekzemple *Krio*, omaĝo al *Krio de Morto*. Ili ankaŭ tradukas ofte ŝercajn ukrainajn popolkantojn, temo de ilia venonta kvara albumo.



Jonny M

Jonas Marx, artista nomo Jonny M, estas germana esperantisto. De 2006 li sin dediĉas al rep-regea muziko en la germana, kaj de 2009 en Esperanto. En somero 2010 li per detala artikolo en la regiona gazeto kaj per pluraj koncertoj li publike prezentiĝis en la regiono de sia hejmurbo Bergisch Gladbach apud Kolonjo kiel kantisto de germanlingva, kontraŭrasisma, junulece verva regeo, kaj iom poste

en tiu jaro ankaŭ liaj esperantlingvaj verkaĵoj atingis signifan publikan konatecon.

Por sia esperantlingva muzikado li elektis la anglecan plumnomon Jonny M [ĜOni EM].

Post libere elŝutebla albumeto *Pli ol espero*, publikigita 2011 Jonny M 2013 eldonis *Regestilo*, sian unuan KD en Esperanto. 2017 sekvis la duobla albumo *Kreativa*.

► <https://www.jonny-m.org/eo>



Jerzy Handzlik

Georgo Handzlik (pole Jerzy Handzlik) estas pola kantisto de Esperanto-kantoj. Li estis edzo de Małgorzata Handzlik, kiu en 2004 elektiĝis en la Eŭropa parlamento. Foje oni lin nomas la „Bardo sen barbo“, laŭ unu el liaj kantoj. Li gvidas en Pollando plurajn entreprenojn, el kiuj inter esperantistoj plej konata estas la eldonejo KLEKS, kiu eldonas librojn kaj sondiskojn en Esperanto kaj la pola lingvo. Georgo Handzlik havas du filinojn. En kelkaj Esperanto-aranĝoj, ekzemple la Universala Kongreso 2018 en Lisbono

kaj Arkones 2018, li kantis kune kun sia filino Dominika Handzlik. En la UK 2013 en Rejkjaviko li pro sia kontribuo al la Esperanto-muziko kaj eldona agado estis honorigita per Diplomo pri Elstara Arta Agado de UEA.



Frey-Lech-Trio

La grupo Frey-Lech Trio estis fondita en 2011 en Bjalistoko laŭ iniciato de Lech Mazurek, fascinita de la beleco de juda muziko en sia klezmera versio.

Teamanoj: **Katarzyna Breczko** – diplomiĝinto de la Muzika Akademio en Lodzo kaj la Pedagogia kaj Psikologia Altlernejo ĉe la Muzika Akademio en Lodzo. Horisto de la Podlasie-Opero kaj Filharmonia Orkestro (2006–2007). Instruisto pri muzikaj kaj artaj klasoj. Edukisto de voĉaj klasoj kaj amanto de juda muziko. En 2015 ŝi realigis la projekton „Shalom na Kamiennej“, kantante furoraĵojn de juda muziko kun junuloj. En 2016 ŝi ricevis la premion de la Prezidanto de la Urba Konsilio de Bjalistoko por elstaraj Instruistoj – Kulturaj Animistoj.

Joanna Gryko – diplomiĝinto de la Muzika Akademio en Varsovio, delonga koncertestro kaj solisto de la Podlasie-Opero kaj Filharmonio, orkestra muzikisto kaj ĉambromuzikisto. Nuntempe konstanta membro de la ensembloj: Jo-anna Duet, Trio Romantico, Trio Aclassico kaj Podlasie Salon Orkiestra. La ludo havas diverstalentan repertuaron (klasika, opero, distra). Ŝi donas koncertojn en Pollando kaj eksterlande. Ŝi kunkreas edukajn programojn por infanoj kaj plenkreskuloj. Li publikigis du albumojn: *Romase Rosyjskie* kun Trio Romantico kaj *Fantazja Księżycowa* kun Dueto Jo-Anna.

Lech Jan Mazurek – grupestro, komponisto, aranĝisto ludanta la ciferecan akordionon. Diplomiĝinto de la Muzika Akademio F. Chopin en Varsovio. Direktoro de la Vojaĝanta Muzika Lernejo, fondinto kaj prezidanto de la Muzika Fondaĵo Barwy Podlasia. Pasia pri muzika edukado por infanoj kaj junuloj, instruisto de pluraj bandoj. En 2012, li surbendigis albumon kun instrumenta muziko kun la Frey-Lech Trio. Du jarojn poste, kun sia junulara grupigo, Młoda Folkowa KREW – klezmera albumo *Ze moce chen be ainai*. En 2015, li kreis la muzikon por la filmo „Piekny czas“ (Belega tempo) de Tomasz Wiśniewski. En 2017, kun la Frey-Lech Trio, li registris la duan diskon *Mia hejmo estis Bjalistoko* en la sinagogo en Tykocin.

► <https://espero.bialystok.pl/eo/frey-lech-trio>



JoMo

JoMo (kun plena nomo: **Jean-Marc Leclercq**) estas okcitana kantisto de Francio kaj Esperantisto. Li venas de Lilo kaj nun loĝas en Tuluzo. Antaŭe li estis kantisto en la grupo Les Rosemary's Babies (La Rozmariaj Beboj). Li montras rimarkeblan emon al lingvodiverseco pere de muziko. Li havas tradician kaj rokan kantrepertuaron en multaj lingvoj, interalie kaj ĉefe Esperanto.

Li surpiedigis sian propran tiaman grupon, La Rozmariaj Beboj, kiu ekfamiĝis komence de la 1990-aj jaroj en la franca alternativa rok-medio. La bando turneis en diversaj landoj (el kiuj Ĉinio), produktis du albumojn kaj eĉ koncertis sur la prestiĝa pariza scenejo Olympia. Post disiĝo de la Beboj, JoMo kreis novan grupon, Liberecanoj, kun kiu li surbendigis KD-on ĉe Vinilkosmo kaj kreis unuan rekordon de multlingva koncerto (22 kantoj en 22 lingvoj), kiu aperis en 2000 en la libro Guinness. Poste kaj sole li surbendigis tutan esperantan albumon titolitan *JoMo friponas!*, kiu aperis fine de 2001. Sekva disko, *JoMo slavumas*, aperis printempe de 2006 kun multaj muzikistoj slavstilaj, kaj poste *JoMo okcitanas*, kie li prezentas tradiciajn okcitanajn kantojn kun esperanta teksto.

Aprile de 2021 aperis lia komuna disko kun propra filino Marta, sur kiu ili kune kantas verkaĵojn de konga esperantista komponisto Majoma Diankembo, sub titolo *Marta kaj JoMo kantas MAJOMan*.

Li daŭre koncertas esperante kaj multlingve, sola kun gitaro, kantante ĝojajn kaj dancigajn kantojn.



Kjara

Chiara Raggi (artistnomo Kjara) estas Esperanto-kantistino, kantaŭtoro, komponistino, kantistino, gitaristino. Ŝi kantas proprajn kantojn en la itala lingvo kaj ekde 2018 ankaŭ en Esperanto.

Naskiĝinte en Rimini, Chiara Raggi studis en Supera Instituto pri Muziko „Giovanni Lettimi“ de Rimini kaj daŭrigis en Konservatorio de Torino „Giuseppe Verdi“. 2018 ŝi estis finalisto ĉe la Nacia Premio Bianca d'Aponte 2018 por la

kantaŭtoro. Ŝia kompaktdisko *Blua Horizonte* aperis tute en Esperanto. Lastdate (14-an de Aprilo 2021) ŝi aparte publikigis *Mozaiko*, kantitan poezion pripensigan, kuraĝigan.

Ŝi estas la unua profesia itala kantistino, kiu uzas Esperanton.

► <https://chiararaggi.net>

Bondeziroj:

Martin Wiese, kiun ni volonte estus invitintaj muziki por ni, estas ankoraŭ obstine batalanta kontraŭ la sekvoj de koronavirusa infekto. Ni sendas elkorajn bondezirojn kaj esperegas, ke li baldaŭ revenos por kun siaj talpoj trafosi la esperantistajn scenejojn.

Danko:

Apartan dankon meritas **Floréal Martorell** (Flo), prizorganto de la eldonejo, disvendejo, studio Vinilkosmo. Li per sugestoj kaj perado esence helpis kompili la vesperan muzikprogramon de tiu-ĉi virtuala kongreso.

► <https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo>

Listo de partoprenantoj

familia/persona nomo

lando aliĝo

familia/persona nomo

lando aliĝo

Disponibla nur en la presita versio

Disponebila nur en la presita versio

Disponebila nur en la presita versio

Disponebila nur en la presita versio

Disponebla nur en la presita versio

Se vi volas havi solidajn sciojn pri esperantologio kaj interlingvistiko aŭ profesiigi pri instruado de Esperanto, partoprenu la sekvan grupon de la Interlingvistikaj Studoj en AMU, Poznano (Pollando), en 2021–24

Tiun eblecon ofertas nur la Adam Mickiewicz Universitato (AMU) en Poznano, unu el la plej signifaj polaj universitatoj ekde 1998.

La 3-jara postdiploma studado servas por **internacia** publiko.

La kursaron gvidas Ilona Koutny kaj kontribuas elstaraj esperantologoj kiel Vera Barandovska-Frank, Tomasz Chmielik, Nicolau Dols, István Ertl, Michael Farris, Sabine Fiedler, Aleksander Korĵenkov, Katalin Kováts, Aleksander Melnikov, Ida Stria kaj Humphrey Tonkin.

La **Interlingvistikaj Studoj** provizas unuflanke la bazojn de

ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, kiuj estas necesaj por konvene loki esperanton inter la naturaj lingvoj, aliflanke prezentas planlingvojn, el kiuj esperanto elkreskis. La internacia kaj interkultura komunikado, por kiu esperanto estis kreita kaj kie ĝi bone funkcias, estas en fokuso. La Studoj koncentriĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto.

En la tria jaro eblas **specialiĝi** pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. La **metodika formado** la Studoj gravas por la instruista trejnado – al kiu eblas aparte aliĝi. En tiu ĉi tereno ekde la studjaro 2007/08 realiĝas kunlaboro kun ILE kaj kun Edukado.net. Jen unika ebleco akiri universitatan atestilon por esperanto-instruistoj.

La semestroj komenciĝos per 5-tagaj **intensaj sesioj** kun kvar studobjektoj (al ili aldoniĝos poste la ekzamenoj). Dum la semestro okazos ankoraŭ po du virtualaj semajnfinaĵ sesioj. Lau la planoj nur la septembraj sesioj estos surloke, la unua sesio en septembro 2021 dependos de la virusa situacio. La dua semestro komenciĝos en februaro. Post pretigo de finlaboraĵo kaj fina ekzameno La studintoj ricevos atestilon pri postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj kiu validas 120 ECTS (eŭropajn studunuojn, same kiel la magistraj studoj).

Partoprenontoj el la tuta mondo povas aliĝi ĝis la **1-a de aŭgusto 2021** por la studoj. La unua sesio okazos inter la 21-a kaj la 25-a de septembro 2021. La sekvaj semajnfinaĵ sesioj fine de oktobro kaj komence de decembro.

Postuloj: diplomo pri superagradaj studoj kaj bona scio de Esperanto (min. B2).

Partoprenontoj devas plenumi orientigan teston komence de la unua sesio.

Kotizo por unu semestro: 1800 PLN (ĉ. 400 EUR), en motivita kazo eblas peti reduktion.

Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj dank'al ESF (*Esperantic Studies Foundation*)

Pluaj informoj kaj aliĝilo: ► <http://interlamu.edu.pl>; ► interlin@amu.edu.pl;

► http://pola-retradio.org/2021/04/e_elsendo-el-la-07-04-2021



Ilona Koutny,
gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Bonvenon en Beroun

La Ĉeĥa Fervojista Esperanto Asocio kune kun Ĉeĥa Landa Asocio de FISAIC sincere invitas vin partopreni la 73-an kongreson de IFEF, kiu okazos en tagoj de 3-a ĝis 9-a Junio 2022 en mezbohemia historia urbo Beroun, Ĉeĥa respubliko. La kongreso okazos en hotelo Grand, kie troviĝas ĉiuj bezonataj ejoj por kunveni, diskuti, labori kaj amuzi. Loĝado kaj manĝado surloke estas memkomprenebla.




La urbo Beroun troviĝas sur la fervojlinio Prago – Pilzeno, same kiel sur samdirekta autoŝoseo. Distanco de Prago estas ĉirkaŭ 35 km. La historio de la urbo estas riĉa kaj longaŭra kaj komencas en la 13-a jarcento. Dum via restado en Beroun vi povos ĝui trankvilan kaj samtempe historian etoson

de ĝia centro. El moderna vidpunkto Beroun estas industria kaj kultura urbo kun belega ĉirkaŭaĵo – naturaj kaj turisme allogaj lokoj – burgo Karlštejn, grotoj Koněpruské jeskyně kaj multaj aliaj.

La organizantoj esperas, ke vi multnombre partoprenos la kongreson kaj ĝuos amikan renkontiĝon.

Postkongreso okazos en Orienta Bohemio en urbo Pardubice kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kun famaj lokoj ekz Hradec Králové, Svitavy kaj ĝia Esperanto muzeo, Litomyšl – naskiĝurbo de komponisto Bedřich Smetana ktp ...



Ĝis revido en Beroun 2022.

Aliĝilo

Pliaj aliĝintoj

☐ Mi estas ordinara membro de Germana Esperanto-

Asocio (GEA)

Atentu: Se vi loĝas en Germanio kaj NE estas ordinara GEA-membro, vi krompagas 30 €.

Mi partoprenos

☐ tuttempe

☐ parttempe de _____ ĝis _____

Mi volas manĝi ☐ vegetare ☐ vegane

Mi preferas ☐ dulitan ☐ unulitan ĉambron*

☐ Mia nomo aperu en la reta listo de aliĝintoj

Mi antaŭpagas 50 € per

☐ IBAN-ĝirado ☐ UEA-Konto

ĝis plej malfrue la _____-an de _____ 2021

* mi krompagas 23,33 € tage

Deutscher Esperanto-Bund e.V.
Esperanto-Laden
Katzbachstraße 25
10965 Berlin

Faksilo: +49 30 4193 5413

Kotizo kaj organizantoj

	ĝis 2021-08-27	ĝis 2021-10-31	poste*
kotizo	440 €	460 €	490 €

* necesa antaŭpago por validigi la aliĝon: 50 €

Kotizadaptingo: La higiena preparado de la domo kaŭzas aldonajn kostojn. Por tiujn kovri ni devis adapti la kotizojn.

La **kotizo** inkluzivas la restadon de la 28-a de decembro 2021, vespere ĝis la 3-a de januaro 2022 matene: loĝado en dulta ĉambro, tri manĝoj tage, trinkaĵoj (minerala akvo kaj pomsuko ĉiutage), programo, silvestra bufero kaj diversaj alkoholaj kaj ne-alkoholaj trinkaĵoj dum la silvestra nokto. Krompago por **unulta ĉambro** 140 eŭroj por tuttempaj partoprenantoj / 23,33 eŭroj tage.

La **ekursoj** estas pagendaj aparte.

Personoj loĝantaj en Germanio, kiuj ne estas ordinaraĵ membroj de Germana Esperanto-Asocio, krompagas 30 eŭrojn.

Partempa partopreno eblas kontraŭ 85 Euroj nokte (inkl. 3 manĝoj kaj programo). Tagaj gastoj pagas 50 eŭrojn tage (inkl. 3 manĝoj kaj programo).

Atentu: Ĉi-jare la LUMINESK* daŭras nur ses noktojn, pro organizaj kialoj flanke de la domo.

Kiu respondecas pri la renkontiĝo?

Kiel en la pasintaj jaroj la ĉefa respondeculo estas Andreas Diemel el Duisburg. Volonte vi povas alparoli lin ĉiam kaj demandi pri detaloj: demandoj@luminesk.de aŭ per fiksreta telefono +49 203 2964 877 (kun alvokrespondilo).

Organiza teamo

Andreas Diemel (ĉeforganizanto)
Barbara Brandenburg (oficejo)
Yoshie kaj Dieter Kleemann (gufujo)

Pago

Aliĝo validas kun antaŭpago de 50 eŭroj

■ al jena konto de Germana Esperanto-Asocio:

IBAN: DE53 5085 1952 0040 1158 42

(Sparkasse Odenwaldkreis)

BIC: HELADEF1ERB

■ aŭ per UEA-Konto geaa-n.

Pagcelo: Luminesk 2021 Münster + via nomo

Bonvolu ĝiri la restsumon ĝustatempe antaŭ la komenco de la aranĝo.



La silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

28-12-2021 – 03-01-2022
Münster/Germanio



Aasee

© Deutscher Esperanto-Bund e.V. 2021

Bildito de
Karin Klein
sur Pixabay

Kio estas LUMINESK'?

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la sesan fojon kaj fariĝis poste-ulo de la iamaj „Internaciaj Festivaloj“ private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon – lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7 ĝis 8 landoj.



Ĉiuj fotoj © Jugendgästehaus Aasee

Kie estos tiu renkontiĝo?

En la historiĝrava urbo de la tielnomata „vestfalia paco“ la tridekjara milito estis finita en la jaro 1648. Tiutempe la riĉaj komercaj familioj influis la bildon de la urbo, hodiaŭ ankaŭ videbla per la multaj pompaj domoj ĉirkaŭ la merkata placo Prinzipalmarkt. En la nuna jarcento Münster estas konata pro sia universitato kaj la universitata hospitalo. La miloj da studentoj pozitive influas la urbocentron. Münster (poŝtkodo 48151) estas atingebla per aŭtoŝoseo kaj pli favore per la IC de Kolonio aŭ Hamburgo. Ĝi situas en bela pejzaĝo de la ebena Münsterland. La arkoiro ĉe la merkato Prinzipalmarkt estas vidinda, same la katedralo Dom kaj la urbodomo, kie la „vestfalia paco“ estis siglita. La multaj studentoj ankaŭ troviĝas sur la vojo de la urba muro, kiu konektas la diversajn urbopartojn ringforme, kompreneble per biciklo, en loka dialekto „leze“.

La domo

LUMINESK'-kunvenejo estos la junulara domo de Münster, kiu situas apud la lago Aasee meze en la urbo. La domo estas moderna, ĵus plia konstruaĵo estis aldonita. Necesejo kaj duŝo situas en la tamboro. La nuna domo estis konstruita en la jaro 1992. La malnova junulargastejo situanta sufiĉe apude havas faman historion en la Esperanto-mondo: Tiun studentan domon ĉe Aasee ni malĝuste antaŭmendo por la IJK en la jaro 1974 ne povis ricevi, ĉar oni ĝin ne ĝustatempe sukcesis finkonstrui. Nur dank al la engaĝiĝo de la organizantoj IJK tamen povis okazi, ili trovis aliajn tranoklokojn.

Programskemo

tempo/tago	28-12 (mar)	29-12 (mer)	30-12 (ĵaŭ)	31-12 (ven)	01-01 (sab)	02-01 (dim)	03-01 (lun)
07:00–09:15				matenmanĝo			
09:15–10:45		programbloko 1		programbloko 5		programbloko 10	adiaŭo
11:00–12:30		programbloko 2		programbloko 6		programbloko 11	
12:30–13:30		tagmanĝo	tuttaga ekskurso		tagmanĝo		
14:00–15:30		programbloko 3		programbloko 7	novjara promeno	duontaga ekskurso	
15:30–16:00		kafopaŭzo		programbloko 8	programbloko 9		
16:00–17:30	alveno		programbloko 4				
18:00–19:30	vespermanĝo		vespermanĝo	silvestra bufedo	vespermanĝo		
20:00–21:30	interkona vespero		vespera programo	silvestra bato	vespera programo		
poste			gufujo / trinkejo		gufujo / trinkejo		

Jen mi aliĝas al la 7-a LUMINESK'!

Persona nomo:

Familia nomo:

Adreso/Strato:

Adreso/Poŝtkodo, Urbo:

Loĝlando:

Naskiĝdato (tt.mm.jjjj):

Retpoŝtadreso:

Telefona fiksa:

Poŝtelefono:

Dato/Subskribo:

☐ Mi volas partopreni kiel taga gasto (sen tranokto)

9-a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA 2021)

17-a ĝis 22-a de oktobro 2021
(dimanĉo ĝis vendredo)
en Palatinato / Rejno-ebenaĵo



© Gerald Roemer

Programo

Ĉiutagaj migradoj en la regiono Palatinato apud Neustadt – en mezalta montaro kun profundaj arbaroj kaj en la Rejno-ebenaĵo laŭlonge de la „Germana Vinostrato“.

Detala programo: www.esperanto.de/ema

La programo estas provizora kiel dum ĉiu migrado, dependas de la aktuala vetero. Ne estos aparta vespera programo. Kiu el la partoprenantoj ŝatus oferti programeron, bv. informi la organizanton.

Necesa sporteca kapablo

Ĉiutage ni migras ĉ. de la 9-a ĝis la 17-a horo – inkluzive paŭzojn. Estos kaj facilaj kaj meze malfacilaj etapoj. Oni kapablu iri distancon de ĉ. 15 km, kun altodiferencoj ĝis 500 metroj.

Transportoj

Publikaj trafikiloj estas relative oftaj, ankaŭ a la junulargastejo. Laŭeble se necese ni uzos ilin.

Kotizo kaj organizanto

	ĝis 2021-03-31	ĝis 2021-07-31	malfruaj birdoj*
Kotizo	320 €	340 €	360 €

* 2021-08-01 ĝis 2021-09-15

Tiu partoprenkotizo validas por unu persono: En 2-lita ĉambro aŭ en plurlita ĉambro por du personoj. Ĝi inkludas 5 tranoktojn kun matenmanĝo, 5 varmajn vespermanĝojn, provianton survoje, enirbiletojn kaj transportojn.

Rabato de 30 € por ordinaraĵ membroj de Germana

Esperanto-Asocio kaj por homoj, kiuj ne loĝas en Germanujo

Krompago por 1-lita ĉambro: 40 €

Kondiĉoj

Via aliĝo ekvalidos, kiam via antaŭpago de minimume 50 € por ĉiu persono atingis la konton de Deutscher Esperanto-Bund

Sparkasse Odenwaldkreis

IBAN: DE32 5085 1952 0040 1145 71

BIC: HELADEF1ERB

Eblas ankaŭ pagi al la UEA-konto: geaa-n

Sur la ĝirilo indiku kiel koncernon:

„EMA 2021“ + via familia nomo.

Vi pagu eventualan reston ĝis 2021-07-31. Por la „malfruaj birdoj“ la aliĝo ekvalidos nur per la pago de la plena kotizo.

La antaŭpago de 50 € ne estos repagata, se vi malaliĝas aŭ ne aperas, sed vi povas ĉiam peri anstataŭanton. Tiu pagos laŭ la aktuala aliĝperiodo. El tio ne rezultu parta repago.

Per via aliĝo vi eksplacite deklaras vian konsenton kun tiuj ĉi kondiĉoj.

Maksimuma nombro de aliĝoj: 20

Nia tranoktejo

Pfalz-Jugendherberge

Hans-Geiger-Straße 27 · 67434 Neustadt

Telefon 06321/2289

www.diejugendherbergen.de/jugendherbergen/neustadt/portrait/

Bv. sendi la aliĝilon al:

Gerald Roemer, Henrietenstr. 47, 20259 Hamburg

Telefona ene de Germanio: 0800-336 36 36-66

ema.aliĝito@esperanto.de

aŭ aliĝu elektronike en la interretaj paĝoj.

Aliĝilo

Reta aliĝo eblas en la interretaj paĝoj

Mi aliĝas al la 9-a EMA 2021 en Palatinato!

(Titolo +) familia nomo, persona nomo:

Kune kun*:

Naskiĝdato (tt.mm.jjjj):

Sekso: ☐ vira ☐ ina ☐ alia

Strato, numero:

Poŝtkodo, loko, ŝtato:

Telefono/poŝtelefono:

Retpoŝta adreso:

Manĝaĵprefero: ☐ sen speciala prefero ☐ vegetara

Miaj nomo kaj loĝloko rajtas aperi en retroŝta dissendlisto de la partoprenantoj ☐ jes ☐ ne

Mi venos ☐ aŭte ☐ trajne ☐ alimaniere.

Mi povus kelkfoje transporti partoprenantojn per mia aŭto: ☐ jes ☐ ne

Mi pagis la sumon de _____ eŭroj

je _____ (dato) per

☐ IBAN ☐ UEA-konto

Aldonaj informoj / programkontribuoj:

* Du personoj, kiuj volas mendi komunan ĉambron, plenigu ĉiu unu aliĝilon kaj aldonu la nomon de la alia persono supre en „Kune kun“.

Daŭripovo



© Jugendherberge Oldenburg

Germana Esperanto-Kongreso

Oldenburg (Oldb)

3-a ĝis 6-a de junio 2022

**kunlabore kun
Esperanto Nederland**

Unua informilo

Kio kaj kie estas Oldenburg

JoachimKohlerBremen
Eigenes Werk, CC BY-SA 4.0



La universitata urbo Oldenburg havas ĉirkaŭ 170.000 enloĝantojn kaj estas la tria plej granda urbo en Malsupra Saksio. Ĝi situas 45 km okcidente de Bremen inter larĝaj marĉoj kaj erikejaj regionoj, nur kelkajn metrojn super marnivelo.

En la jaro 1345 Oldenburg ricevis la urborajtojn. Ĝi estis rezidejo de grafa, duka, grandduka kaj federacia lando Oldenburg, de 1811 ĝis 1813 eĉ travivis „Franca tempon“ sub rego de Napoleono. Ne mirigas do la abundo de historiaj konstruaĵoj vizitindaj. Invitas multaj muzeoj, la 1967 inaŭgurita piedira zono kaj laste sed ne balaste logas BergstraÙe malkovri ties ascendon.

La biciklo estas la plej populara veturilo por Oldenburganoj. Laŭ studo de la Aŭstra Transporta Klubo (VCÖ) en 2016, Oldenburg estas unu el la plej biciklemaj urboj en Eŭropo laŭ la procentaĵo de bicikloj en ĉiutaga trafiko.

Kiel veni al Oldenburg

De sude **aŭtomobilistoj** forlasas la aŭtoŝoseon A29 per elirejo Oldenburg-Ohmstede, de aliaj direktoj forlasu la aŭtoŝoseon A28 per elirejo Oldenburg-Bürgerfelde. Regiona **trajno** bezonas 35 minutojn de la ĉefstacio de Bremeno al Oldenburg; de okcidente vi atingas Oldenburgon per trajno tra Leer. La plej proksima **aviadejo** estas en Bremeno. De tie per tramo 6 al la ĉefstacio de Bremeno, kaj poste trajne al Oldenburg.

Atentigo: La junulargastejo mem **ne disponigas parkejojn!**

Detaloj troveblas en www.esperanto.de/eo/gek2022 ▶ Alvojaĝo

La kongresejo

Prelegoj, laborgrupoj, kunsidoj kaj aliaj programeroj okazos ĉefe en la seminarioj salonoj de la **junulargastejo Oldenburg**. Tie estos ankaŭ la libroservo kaj la kongresa oficejo.

La nova junulargastejo estis malfermita en oktobro 2019. Ĝi estas moderne ekipita kaj ideale konvena por tiaspekaj kunvenoj. Krom moderne ekipitaj seminarioj ĝi ofertas ankaŭ grandan kaj belan ripozejon en la vestiblo kun multaj sidlokoj kaj grandan terason.

Por niaj partoprenantoj ni rezervis preskaŭ la kompletan domon kaj do disponigas (limigitan) nombron da tranoktejoj kun plena pensio en la junulargastejo mem.

Centra renkontejo kaj kongresa adreso estas la junulargastejo:

Jugendherberge • StraÙburger StraÙe 6 • 26123 Oldenburg • +49 441 87135.

La malferma kunveno okazos sabate antaŭtagmeze en la *City Club Hotel Oldenburg*.

Ĝi estas piede atingebla de la junulargastejo.

City Club Hotel Oldenburg • Europaplatz 4–6 • 26123 Oldenburg • +49 441 8080



© CCH Oldenburg

La kongresa programo

La ĉeesta programo ofertos prelegojn kaj laborgrupojn pri interesaj temoj, ampleksan libroservon, regionajn ekskursojn kaj vesperajn kulturprogramojn.
Elektitajn virtualajn programerojn vi povos partopreni per Zoom.

Ĝenerala programskemo

	vendredo 2022-06-03	sabato 2022-06-04	dimanĉo 2022-06-05	lundo 2022-06-06
08:00–09:30		matenmanĝo		
09:30–12:00		kongresa malfermo prelegoj	membrokunveno GEA laborgrupoj ekskursoj	ferma kunveno
12:00–13:30		tagmanĝo		
13:30–15:00		prelegoj laborgrupoj ekskursoj	prelegoj laborgrupoj ekskursoj	forveturo, eventuale kunsidoj
15:00–15:30	alveno akcepto	kafopaŭzo		
15:30–18:00		prelegoj laborgrupoj ekskursoj	prelegoj laborgrupoj ekskursoj	
18:00–19:30	vespermanĝo			
20:30–21:30	interkona vespero	vespera programo	vespera programo	

Detalojn pri la programo ni komunikos en la dua informilo.

La organizan teamon vi atingas per:

Deutscher Esperanto-Bund e.V.
Franz Kruse
Elsflether Weg 3
27809 Lemwerder

Telefono: +49-421-6979958 (ene de Germanio ankaŭ: 0800-3363636-61)
Fakso: +49-421-678696

Retpoŝto: gek@esperanto.de

La kotizoj

La kotizo indikita maldekstre validas por A-landanoj. La reduktitan kotizon dekstre pagu akompanantoj, handikapuloj (kun atesto), senenspezuloj kaj junuloj ĝis 25 jaroj.

Aliĝo	ĝis 2021-12-31	ĝis 2022-03-31	poste aŭ surloke	tagbileto*
Kotizo	70 / 40€	80 / 55€	100 / 80€	50 / 40€

* Tagbiletoj haveblas nur surloke, neniuj rabato, 15/10€ krompago.

Krompago Krompago de 30 / 20€ por partoprenantoj kun loĝejo en Germanio, kiuj ne estas membroj de Germana Esperanto-Asocio.

Rabato de 30 / 20€ por partoprenantoj el B-landoj.

Loĝebloj en la junulargastejo

Aliĝante bonvolu informi nin, se vi volas mendi loĝadon en la junulargastejo.

La ĉambroj estas dulitaj; trian kaj kvaran liton eblas aldoni. La ĉambroj do estas uzeblaj kiel unu- ĝis kvarlitaj.

La prezoj enhavas 3 tranoktojn, manĝojn matene, tagmeze kaj vespere (de vespermanĝo vendreda ĝis tagmanĝo lunda), litaĵon, garnituron de mantukoj.

La kotizo indikita maldekstre validas por aĝo ĝis 26 jaroj, la dekstra por aĝo ekde 27 jaroj.

ĉambro	unulita	dulita	tri- aŭ kvarlita
prezo por 1 persono	200 / 220€	155 / 175€	140 / 160€

Atentu: La kvanto de ĉambroj en la junulargastejo estas limigita.

Mendoj por ili do bezonas konfirmon flanke de la LKK.

Hoteloj

Ekzistas listo de hoteloj en la ĉirkaŭo de la junulargastejo. Ĝi enhavas adreson, telefonnumeron kaj piediran distancon al la kongresejo; ligita mapo montras la ĝustan vojon. La listo de hoteloj troviĝas en la retpaĝo www.esperanto.de/eo/gek2022 ▶ Loĝado

Kiel aliĝi?

Aliĝo per la reto

Se iel eble, uzu la retan aliĝilon:

■ <https://www.esperanto.de/eo/gek-2022-alighilo>

Aliĝo per poŝto

Deutscher Esperanto-Bund e.V. • Brigitte Kranz • Langenweg 176 • 26125 Oldenburg

Kongresa konto

■ Deutscher Esperanto-Bund
Sparkasse Odenwaldkreis
IBAN: DE09 5085 1952 0040 1145 97
BIC: HELADEF1ERB

Bonvolu nepre ĝiri kun titolo: „**GEK 2022**“ + **via antaŭnomo** + **via familia nomo**
Via aliĝo ekvalidos, kiam via kongresa kotizo atingis la konton de GEA.

Mi aliĝas al la Germana Esperanto-Kongreso 2022 en Oldenburg, 3-a ĝis 6-a de junio 2022

Familia nomo, persona nomo:

Naskiĝdato (tt.mm.jjjj):

Akompananto(j) (necesas aparta aliĝo):

Strato, numero:

Poŝtkodo, loko, ŝtato:

Telefono/poŝtelefono:

Retpoŝta adreso:

Mi deziras loĝi en la junulargastejo laŭ la indikitaj kondiĉoj ☐ en 1-lita ĉambro

☐ en 2-lita ĉambro

☐ en 3-/4-lita ĉambro kune kun* _____

☐ Mi ĝiris la sumon de _____ eŭroj por kotizo ☐ normala ☐ reduktita

je _____ (dato) al la indikita konto de GEA.

Miaj nomo kaj lando rajtas aperi

en la kongreslibro ☐ jes ☐ ne

en la interreto ☐ jes ☐ ne

en retpoŝta dissendolisto

de la partoprenantoj ☐ jes ☐ ne

Dum la kongreso estos farataj fotoj. Povas esti, ke vi estos videbla sur tiaj fotoj.

Mi konsentas, ke fotoj, sur kiuj mi estas videbla, estos publikigataj en la asocia revuo, en la retpaĝo kaj/aŭ en sociaj retoj ☐ jes ☐ ne

Aldonaj informoj / programkontribuoj:

Aliĝo per poŝto

Deutscher Esperanto-Bund e.V. • Brigitte Kranz • Langenweg 176 • 26125 Oldenburg

* Personoj, kiuj volas mendi komunan ĉambron, plenigu ĉiu unu aliĝilon kaj aldonu la nomon de la alia(j) persono(j) supre en „kune kun“.

agadas en Goma, DR Kongo

Dum ni ĝuis la kongreson, en la du-miliona urbo Goma, orienta parto de la *Demokratia Respubliko Kongo*, erupciis danĝera vulkano. Ek de tiam regas granda paniko kaj kaoso:



Goma brulas, la 22-an de majo 2021

Post pli ol 20 jaroj da intercivitana milito kun multaj suferoj kaj mortigoj, la 22-an de majo 2021 la proksima vulkano *Nyiragongo* erupciis – post la jaro 2002 la unuan fojon, kiam multaj homoj perdis ĉion. 400 000 enloĝantoj panike fuĝis el Goma.

Ĉie mankas akvo kaj elektro, sentblas tertremoj, metangaso sub la lago povus mortigi homamasojn, se ĝi eliĝas. Nin tre tuŝas tiuj novaĵoj, ĉar rande de Goma vivas multaj georfoj de la *Asocio Nova Familio*, kiuj perdis nun siajn hejmojn, ĉiujn havaĵojn kaj manĝaĵojn. Multaj ankoraŭ survojas ie.

Du aktualaj kaj urĝaj projektoj de ANF estas rapida helpo post la vulkanoerupcio kaj la projekto pri geonkloj.

En 2019 estis ankoraŭ ĉirkaŭ 130 infanoj, en majo 2021 jam pli ol 200 georfoj, por kiuj ni organizas **lernejokotizojn, manĝaĵojn, vestaĵojn, lernejomaterialojn, medicinan helpon** kaj ankaŭ instruas al ili **Esperanton**.

Jam antaŭ la vulkano-erupcio ili havis malfacilegajn vivkondiĉojn: Multaj ne-regule manĝas, dormas sur planko aŭ bretoj sen matracoj, sen kovriloj; mankas ŝuoj, kiuj protektus la piedojn de la akraj vulkanaj ŝtonoj ktp. Ni jam de longe revas pri propra hejmo por vivi tie sekure, komforte kaj sate. Propra orfejo estas nia longtempa projekto.

En Goma ne la ŝtato pagas por la edukado, sed la familioj. Ĉiu lernejo mem decidas la kotizon, kio gvidas al **tre malfacila situacio por niaj georfoj. Iliaj lernejoj postulas momente por jaro po infano proksimume 110 €** (baza lernejo), **200 €** (meza lernejo), **525 €** (universitato). Kiam oni ne pagas ĝustatempe, oni estas forpelita kaj maltrafas ekzamenojn, pro kio necesas ripeti la klason. Tio okazadis dum la lastaj jaroj. Diabla cirklo.

Dum la pandemio

facila situacio por niaj georfoj. Iliaj lernejoj postulas momente por jaro po infano proksimume 110 € (baza lernejo), **200 €** (meza lernejo), **525 €** (universitato). Kiam oni ne pagas ĝustatempe, oni estas forpelita kaj maltrafas ekzamenojn, pro kio necesas ripeti la klason. Tio okazadis dum la lastaj jaroj. Diabla cirklo.

La ANF trovas daŭre nur ioman subtenon. Tial ni povis subteni en la lernejojaro 2020/2021 nur 110 infanojn de niaj 205 georfoj. Nia ĉefa celo nun estas longtempa plano: **Kio okazus se 205 privattuloj, grupoj, asocioj kaj kluboj transprenus la respondecon por po unu (aŭ pli) infano jare?** Ni povus sendi ĉiujn niajn georfojn tutjare al la lernejo sen timi ke oni forpelas ilin. Ili sukcesus la jaron.

Do ni alvokas vin ĉiujn! Kuniĝu kun aliaj, preparolu en viaj kluboj kaj asocioj, diskonigu la informojn, kie vi povas. Ni ĝojas pri ĉiu helpo! **Skribu al orfojkongo@gmail.com**



Pli da informoj je ▶ <https://www.esperanto.de/eo/asocio-nova-familio>
▶ <https://www.facebook.com/AsocioNovaFamilio>

Por aktiva kunlaboro: telegramo-grupo ▶ https://t.me/joinchat/HVS9HruG_OuiF3f4

Donacintoj, kiuj helpis financi nian kongreson

Anna Abelovska	Ingrid Gleitsmann	Lene Niemann
Agnieszka Baczura	Jadwiga Greger	Ursula Niesert
Cosetta Bernardi	Ralf Haumer	Luigia Oberrauch Madella
Wera Blanke	Zoja Haumer	Leopold Patek
Enrico Gaetano Borello	Matthias Hecking	Adwokat Piotr
T. Bormann	Bruno Henry	Stanisław Polanowski
Serio Boschin	Robert Kamiński	Theresia Pyrcherer
Clara Bracke	Dieter Kleemann	Ernst Quietensky
Barbara Brandenburg	Yoshie Kleemann	Uta Radicke
Ulrich Brandenburg	Dieter Klose	Jörg Radicke
Emma Breuninger	Franz Knoeferl	Wolfgang Schwanzer
Hans-Hermann Bühl	Zbyszek Kowalski	Zofia Śmistek
Marc Cuffez	Siegfried Krüger	Andrzej Sochacki
Raphael Das Gupta	Anna Laskowska	Sara Spanò
Bodo Ehrlich	K. D. Leith	Carlos Spínola
Goar Engeländer	Wiesław Libner	Martin Stuppig
Hedwig Fischer	Stanisław Mandrak	Alina Szczepańska
Rudolf Fischer	Jaroslav Matuska	Ewa Szymańska
Świętosław Fortuna	Agnieszka Mozer	Vito Tornillo
Halina Fuchsel	Alina Mozer	Kristin Tytgat
Floreal Gabalda	Aleksandr Mul	Gerhard Weber
Liba Gabalda	Marek Nahajowski	Manfred Westermayer
Horst Gleitsmann	Jan Niemann	Hans Peter Zilvar

Registraĵoj de la kongreso

La GEK-YouTube-kanalon vi povas trovi serĉante „Germana Esperanto Kongreso“ ene de YouTube aŭ pere de ► <https://www.youtube.com/channel/UCOVPGHLsQcaH7Q2mjQc-tA>



**La Fonduso
por German-Pola
Kunlaboro**

**FUNDACJA WSPÓŁPRACY
POLSKO-NIEMIECKIEJ**

**STIFTUNG
FÜR DEUTSCH-POLNISCHE
ZUSAMMENARBEIT**

Nia Transponta Kongreso ricevas financon subtenon de la Fonduso por German-Pola Kunlaboro. Pollando kaj Germanio kreis tiun fonduson, kiam ili lanĉis novan etapon de rilatoj inter ambaŭ landoj post la reunuiĝo de Germanio. Jura bazo de la fonduso estas interregistara kontrakto subskribita en 1991. En la decidaj organoj de la fonduso Pollando kaj Germanio estas egale reprezentitaj. Ĝia sidejo troviĝas en Varsovio.

La fonduso – kiu finansas sin el la interezo de sia kapitalo – subtenas komunajn ne-komercajn iniciatojn utilajn por la german-polaj rilatoj. Kun tiu celo ĝi ĉiujare subvencias pli ol 800 projektojn je la loka nivelo, el scienco, kulturo kaj amaskomunikiloj. De sia kreiĝo ĝis hodiaŭ la fonduso subtenis pli ol 16.000 projektojn per entuta sumo de preskaŭ 313 milionoj da eŭroj.